
EL POPOLA ĈINIO

6
1976
中国报道






Nova Klasĉambro de la Fiŝista Vilaĝo          de *Peng Ming* (komunumano)

# Antaŭenmarŝu laŭ la revolucia eduka linio de Prezidanto Maŭ

Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj varme bonvenigas diplomitojn de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto, kiuj revenas al sia hejmloko por konstrui novan socialisman kamparon.





Studentoj de la Komunisma Labora Universitato de Gianghi resumas sperton de kulturado de altproduktiva kolzo sur kampo.




Post diplomitiĝo el la Laborista Universitato "La 21-a de Julio", Ŝen Guansong (maldekstre), tekni
kisto de la Instituto de Frotum-maŝina Projektado de la Ŝanhaja Maŝinfabriko, revenis al la fabrik
kaj sukcese fabrikis kune kun laboristoj la unuan kamo-frotum-maŝinon numerale kontrolatan de Ĉinio





Veterana kamparano konigas scio pri kulturado kaj flegado de koto plantoj sur kampo al la lernantoj la agronomia lernejo de Jeĉen gubernio de Hingiang.



Lernantinoj de la agronomia lerne de Lunjuan-a Va-nacieca Aŭtonom Gubernio de Junnan-provinco aplika la lernitan teorian scion en kaŭĉu arbaro de la lernejo.

EL POPOLA ĈINIO
中国报道

N-ro 6
(215)
1976

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

BILDPAĜOJ:

1. Antaŭenmarŝu laŭ la revolucia eduka linio de Prezidanto Maŭ
2. Novjaraj pentrajoj
3. Pentrajoj de infanoj
4. Novaj sukcesoj de la Dalian-a Kemifizika Instituto


KOVRILO:

Paĝo 1: Nudpieda kuracistino lernas de veterana ĉinmedicina kuracisto.

Paĝo 2: Nova klasĉambro de la fiŝista vilaĝo

Paĝo 3: Fajencaj figuroj trovitaj en tombejo de Kin-dinastio

Paĝo 4: Laborista sanatorio ĉe Tajhu-lago




## Enhavo

Granda venko . . . . . . . . . . . . . . . . 2
Granda debato pri la eduka revolucio . . . . . . 9
Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto — novtipa alta lernejo . . . . . . . . . . . . 16
Vang Dahjue en scienca esplorado . . . . . . . . 22
Mi venis vere al la kamparo inter terkulturistojn . . . 25
Ekfruktis sterilaj pomarboj . . . . . . . . . . 29
Novaj floroj de pikturo . . . . . . . . . . . 31
Mia pentrajo . . . . . . . . . . . . . . . 35
"Nudpieda" kuracisto Liu Han . . . . . . . . . 37
AMIKECO: Neforgesebla vizito al Meksikio . . . 41
ĈINAJ NACIECOJ: La Tuĝjaoj . . . . . . . . 43
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Fajencaj homoj kaj ĉevaloj de pli ol 2,000 jaroj . . . . . . . . . . . . 45
TRA ĈINIO: Gianghan-ebenaĵo . . . . . . . . 47
KURANTAJ AFEROJ . . . . . . . . . . . . . 50
ESPERANTA ANGULO: Ĝoja renkontiĝo . . . . 51
Song Giang — kapitulacisto en "Akvorando" . . . . 52

# GRANDA VENKO

## —La armeo kaj popolo de Ĉinio varme subtenas la du rezoluciojn




*Kun proleta amo al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, la popolo kaj ĈPLA-anoj de Pekino okazigis grandiozan manifestacion por varme aklami la du rezoluciojn de CK de KPĈ kaj indigne kondamni la krimojn de Deng Hiaŭping, la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj rifuzanta pentofaron.*

LAŬ propono de la granda gvidanto de la Ĉina popolo Prezidanto Maŭ, la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio unuanime aprobis du gravajn rezoluciojn en la 7-a de aprilo, 1976: nomi kamaradon Hua Guofeng la unua vicprezidanto de CK de KPĈ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro; eksigi Deng Hiaŭping je ĉiuj en- kaj ekster-partiaj oficoj kaj permesis lin konservi la partian membrecon por vidi, kiel li kondutos en la

## CK de KPĈ kaj indigne kondamnas la krimojn de Deng Hiaŭping

estonteco. Tio estas grava aranĝo farita de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio por kontraŭbatali kaj preventi reviziismon kaj garantii daŭrigon de la revolucio de la Partio kaj ŝtato sub la diktaturo de la proletaro, kaj estas ankaŭ granda venko en rebato al la vento de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn.

Informiĝinte pri la ĝojiga novajo, ĉie ekjubilis la popolo. De la ĉefurbo Pekino ĝis malproksimaj landlimaj regionoj, de la areoj norde de la Granda Muro ĝis tiuj sude de Jangzirivero, de la piedo de Kunlunmontaro ĝis la bordo de la Orienta Ĉina Maro, milionoj kaj milionoj da armeanoj kaj popolanoj manifestaciis tamburante kaj tamtamante por ĝoje celebri la venkon. Diversaj lokoj de la lando okazigis solenajn mitingojn kaj sendis telegramojn al Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio por esprimi sian varman kaj firman subtenon al la du saĝaj rezolucioj, aklami la grandan venkon de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj indigne kondamni la krimojn de Deng Hiaŭping.



*En la kontraŭrevolucia politika incidento sur Tian-anmen-placo, la soldatoj gardantaj la placon brave defendis la majestan nacian standardon. Jen ili matene hisas la kvinstelan standardon por ke ĝi flirtu alte super Tian-anmen-placo.*



*La laboristoj-milicianoj de la Pekina Unua Ilmaŝina Fabriko montris revolucian sentimecon en frakaso de la kontraŭrevoluciaj politikaj aktivadoj sur Tian-anmen-placo, por defendi Prezidanton Maŭ, la Centran Komitaton de la Partio, la revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj la grandan ĉefurbon de la patrolando.*

Deng Hiaŭping estas la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj rifuzanta pentofaron. Delonge li oponas kontraŭ Prezidanto Maŭ, Maŭzedongpenso kaj la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, li antaŭenpuŝis kontraŭrevolucian reviziisman linion kune kun Liu Ŝaŭki; en la komenca periodo de la kultura revolucio, li antaŭenpuŝis burĝan reakcian linion kune kun Liu Ŝaŭki por subpremi la amasojn. Kritikite de amasoj, li esprimis volon de pentofaro kaj diris, ke li "neniam renversos la ĝustajn verdiktojn". Prezidanto Maŭ provis savi lin kaj donis al li ŝancon denove labori, sed li vanigis la edukon kaj helpon de Prezidanto Maŭ al li. Kaptinte parton de povo en la manoj, li falis denove en sian malsanon, klopodis por nei la grandan kulturan revolucion, reguligi la kontojn kun ĝi, ellaboris la reviziisman programon "preni la tri instrukciojn kiel ĉefĉeneron", plue antaŭenpuŝis kontraŭrevolucian reviziisman linion kaj ludis gvidan rolon en levado de vento de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn.

Kun akraj okuloj povantaj vidi foran estontecon, Prezidanto Maŭ rimarkis la aktivadojn de Deng Hiaŭping por renversi la ĝustajn verdiktojn, faris serion da gravaj instrukcioj kaj gvidis la tutan partion, la tutan armeon kaj la tutan popolon al granda batalo kontraŭ la vento de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn. Prezidanto Maŭ montris: **"Li ja estas homo kiu ne tenas klasbatalon kaj li neniam parolas pri tiu ĉefĉenero." "Li ne komprenas Marksismon-Leninismon kaj reprezentas la burĝan klason. Li promesis 'neniam renversi la ĝustajn verdiktojn', sed tio estas nekredinda."** La instrukcioj de Prezidanto Maŭ pikis al Deng Hiaŭping la vundan lokon kaj malkaŝis lian reakcian klasan naturon.

En la unua tagdeko de aprilo, kiam la vastaj amasoj de kadroj kaj popolanoj de la tuta lando estis kritikantaj la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Deng Hiaŭping laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ, plenmano da klasaj malamikoj kreis post kovado, planado kaj organizado, kontraŭrevolucian politikan incidenton sur Tiananmen-placo, kun preteksto de memorigo pri la forpasinta Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj je la Festo de Klaro kaj Brilo. Ili publike elmontris sloganon pri subteno al Deng Hiaŭping, freneze direktis sian lancpinton al Prezidanto Maŭ, klopodis por spliti la Centran Komitaton de la Partio estratan de Prezidanto Maŭ, senskrupule faris reakciajn paroladojn, elpendigis reakciajn poemojn kaj sloganojn. En la 5-a de aprilo, ilia kontraŭrevolucia aktivado atingis la kulminon, ili eĉ bruligis domon kaj aŭtojn kaj batis homojn, kun senbrida kontraŭrevolucia aroganteco. Sed kiam ili faris frenezan kontraŭrevolucian aktivadon, ĉefurbaj laboristaj milicianoj je ordono de la Pekina Revolucia Komitato rapide frakasis la kontraŭrevolucian politikan incidenton kaj praktikis diktaturon de la proletaro super la plenmano da klasaj malamikoj, en kunago de popolaj policanoj kaj gardantaj soldatoj. Konsiderinte la kontraŭrevolucian politikan incidenton sur Tian-anmen-placo kaj la kondutojn de Deng Hiaŭping en la lasta tempo, la Centra Komitato de la Partio opiniis, ke la naturo de la problemo de Deng Hiaŭping jam turniĝis en antagonisman kontraŭdiron, kaj decidis eksigi lin je ĉiuj oficoj en kaj ekster la Partio.

La rezolucioj de la Centra Komitato de la Partio multe kuraĝigis la revolucian popolon kaj forte batis la arogantecon de la klasaj malamikoj. Ekde la vespero de la 7-a de aprilo kiam publikiĝis la rezolucioj, popolanoj de nia ĉefurbo torentis senĉese al Tian-anmen-placo de ĉiuj flankoj por celebrado kaj manifestacio. En la 8-a la nombro de la revoluciaj popolanoj irintaj





*La instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj de Kinghua-universitato kunvenas por subteni la du rezoluciojn.*

al la placo atingis pli ol milionon. Laboristoj, lernantoj, ŝtataj kadroj, ĈPLA-anoj kaj komunumanoj de la antaŭurboj marŝis ŝultro ĉe ŝultro kaj kuraĝigis unuj aliajn. Huraoj kaj kantoj el la manifestaciaj kolonoj formis potencajn ondojn de voĉo super Tian-anmen-placo.


La vasta majesta Tian-anmen-placo estas heroa placo kaj revolucia simbolo. Je la 1-a de oktobro de 1949, la granda gvidanto de la diversnacieca popolo de Ĉinio Prezidanto Maŭ persone hisis la unuan kvinstelan ruĝan standardon sur ĝi kaj solene proklamis la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko. Ekde tiam, Prezidanto Maŭ foje kaj refoje revuis la revolucian popolon ĉe la placo. Antaŭ dek jaroj, Prezidanto Maŭ okfoje revuis tie pli ol dek milionojn da junaj ruĝgvardianoj el ĉiuj lokoj de la tuta lando, persone ekbruligis la fajregon de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj direktis tiun grandan revolucian batalon de venko al venko. Sed la batalo ja ne finiĝis kaj la kontraŭrevolucia politika incidento kreita de plenmano da klasaj malamikoj sur Tian-anmen-placo ja estas konkreta pruvo. La vasta popolo de nia ĉefurbo diris indigne: "Tian-anmen-placo estas kore respektata loko de la ĉiunacieca popolo de Ĉinio. Ni absolute ne permesos al plenmano da kontraŭrevoluciuloj fiagi sur ĝi!" La netolerebla malordo kaŭzita de la plenmano da klasaj malamikoj estis rapide likvidita, la tuta placo nun plenas je revolucia viveco, la ruĝa kvinstela standardo alte flirtas, kaj la Monumento de Popolaj Herooj alte staras kiel giganto. La verdaj pinoj kaj cipresoj en la ĉirkaŭaĵo de la placo kaj la ruĝaj standardoj en kontrasto kune formas belan bildon.

La rezoluta batalado de la popolo de nia ĉefurbo kontraŭ Deng Hiaŭping kaj la plenmano da klasaj malamikoj, kiuj kreis la kontraŭrevolucian politikan incidenton sur Tian-anmen-





*150,000 laboristoj de Daking-olekampo kunvenas por subteni la du rezoluciojn.*



*Tricent mil popolanoj kaj ĈPLA-anoj de Ŝanhajo okazigas grandiozajn mitingon kaj manifestacion por esprimi sian rezolutan subtenon al la du rezolucioj de la Centra Komitato de la Partio.*

placo, ricevis fortajn subtenojn kaj laŭdojn de la popolo de la tuta lando. Popolamasoj, milicianoj kaj ĈPLA-anoj de ĉiuj lokoj de la tuta lando alsendis telegramojn al la laboristaj milicianoj, popolaj policanoj kaj gardantaj soldatoj por esprimi sian firman subtenon al ilia revolucia ago kaj sian decidon lerni de ili. Batalantoj de garnizonaj trupoj ĉe la landlimoj de Hejlonggiang, Hingiang, Interna Mongolio kaj Tibeto kaj milicianoj de diversaj naciecoj diris: Kvankam ni estas je miloj da kilometroj fore de Tian-anmen-placo, tamen nia koro strikte ligiĝas kun la ĉefurbo. Ni nepre plifirmigos la unuiĝon de la armeo kaj la popolo, plifortigos la kunan defendon de la armeo kaj la popolo, ĉiam pretos bati lupojn firme tenante pafilon en la mano kaj batalos kontraŭ reviziismo ĝis la fino. La vastaj amasoj de oficistoj kaj laboristoj sur la industria kaj trafika frontoj de ĉiuj lokoj de la tuta lando, kiuj persistas en laborpostenoj, esprimis unuj post aliaj, ke ili nepre donos fortajn batojn al la freneza provoko de Deng Hiaŭping kaj la plenmano da klasaj malamikoj per bonegaj atingoj



*La kadroj kaj komunumanoj de Daĝaj-brigado kunvenas por subteni la du rezoluciojn.*

en revolucio kaj produktado, kaj se la lastaj aŭdacos krei ie ajn incidentojn por subfosi la revolucion kaj produktadon, ili rezolute donos al ili solidajn batojn kiel la revolucia popolo de la ĉefurbo faris.

La kontraŭrevolucia politika incidento sur Tian-anmen-placo per negativa ekzemplo profunde edukis la tutlandan popolon pri klasbatalo. Ĝi konigis al la popolo, kiel akra kaj komplika estas la klasbatalo en la socialisma periodo. Ĝi ankaŭ montras, ke la vasta popolo ja volas revolucion kaj forte malamas tiujn kontraŭrevoluciulojn. Kiel ajn arogantaj montriĝis la plenmano da klasaj malamikoj, ili tamen falis tuj je bato de la revoluciaj amasoj kaj la potenca diktaturo de la proletaro.

La du rezolucioj de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio fortege stimulis la batalvolon de la tuta partio, la tuta armeo kaj la tuta popolo. Ili decidis pli firme unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ, firme teni la ĝeneralan direkton de la batalo, koncentre kritiki Deng Hiaŭping, kritiki lian reviziisman programon "preni la tri instrukciojn kiel ĉefĉeneron", kritiki lian kontraŭrevolucian reviziisman linion, kritiki liajn krimojn de neado de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj reguligo de kontoj de la kultura revolucio, kun la vana espero renversi la diktaturon de la proletaro kaj restaŭri kapitalismon, kaj ĝisfine konduki batalon kontraŭ la vento de dekstra oportunismo por renverso de la ĝustaj verdiktoj.

JOŬ HAN:

# Granda debato pri la eduka revolucio

LA granda debato pri la eduka revolucio, kiu vigle disvolviĝas en altaj, mezaj kaj elementaj lernejoj de Pekino kaj la tuta lando, estas konsistiga parto de la nuna batalo de Ĉinio kontraŭ la reviziisma linio. La debato temas pri fundamentaj problemoj de la eduka sfero, kiel ekzemple:

Ĉu la socialismaj altaj lernejoj devas varbi siajn studentojn el laboristoj kaj kamparanoj, kiuj havas praktikan sperton, aŭ ne?

Ĉu la socialismaj lernejoj devas preni kiel sian taskon kulturi lernantojn en klerajn laborulojn kun socialisma konscio aŭ ne?

Ĉu la socialismaj lernejoj devas esti funkciigataj kun malfermita pordo, por ke eduko strikte kombiniĝu kun klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado de la socio, la instruistoj kaj lernantoj havu sentimenton de laboristaro kaj aliaj laborantaj popolanoj kaj instruado strikte kombiniĝu kun produkta laboro kaj bezono de la ŝtato, aŭ ne?

Ĉu socialismaj lernejoj nepre devas esti sub la forta gvidado de la avangardo de la proletaro — la Komunista Partio de Ĉinio aŭ ne?

ktp. ktp.

En tiuj demandoj la proleta eduka linio kaj la reviziisma eduka linio akre batalas unu kontraŭ la alia kaj havas tute malsamajn respondojn: la unua tute jesan dum la dua tute nean.

La batalo de la eduka fronto estas nek izolita nek hazarda, ĝi havas profundan politikan fonon. La Granda Proleta Kultura Revolucio fra-




*Kun granda revolucia entuziasmo la revoluciaj instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj de Kinghua-universitato sin ĵetas en la batalon kontraŭ la vento de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn.*

kasis la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ kaj iliajn intrigojn pri restaŭro de kapitalismo kaj firmigis la diktaturon de la proletaro de nia lando. Tamen la burĝaro ne volas akcepti sian malvenkon kaj ĉiamaniere klopodas por fari reatakon. Somere kaj aŭtune de la pasinta jaro la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon Deng Hiaŭping, kiu antaŭenpuŝis reviziisman linion sekvante Liu Ŝaŭki antaŭ la kultura revolucio, estis kritikita en la kultura revolucio kaj ne pentofaris ĝis nun, elmetis diversajn reviziismajn absurdajn teoriojn por nei la grandajn atingojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio, nei la novajn socialismajn aferojn aperintajn en la kultura revolucio, levis venton de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn kaj disvastigis reviziisman linion kontraŭstarantan al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kun la vana espero restaŭri kapitalismon. Tiu vento influis ĉiujn frontojn precipe la edukan. Malmultaj gvidantoj de Kinghua-universitato kaj aliaj unuoj de la eduka fronto, kiuj praktikis la reviziisman linion antaŭe, elsaltis denove por ataki la edukan revolucion kaj renversi la ĝustajn verdiktojn de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj ĉiamaniere klopodis por

restarigi la reviziismajn aranĝojn kaj agmanierojn. Prezidanto Maŭ akre vidis la novan tendencon de la klasbatalo, ĝustatempe iniciatis kaj gvidis la batalon kontraŭ la vento de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn kaj disvolvis revolucian debaton por kritiki la reviziisman linion de Deng Hiaŭping. La revolucia debato estas komencita en la eduka fronto. Kinghua-universitato la unua komencis rebati la reviziisman linion en la pasinta novembro.


Kinghua-universitato kun historio de 65 jaroj estis citadelo de la burĝa eduko. Nun ĝi jam fariĝis modelo de nova proleta alta lernejo dank' al reformado en la Granda Proleta Kultura Revolucio. En la lasta pli ol duonjaro, sub la gvido de la partia komitato de la universitato, la instruistoj kaj studentoj skribis dekmilojn da dazibaŭoj kaj okazigis centojn da kritikaj kunvenoj, sen interrompo de la instruado, scienca esplorado kaj produktado. Ili rebatis la atakon de la burĝaro per elokventaj faktoj pri la profunda ŝanĝo de la universitato post la komenco de la kultura revolucio.

Nun Kinghua-universitato varbas studentojn el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kiuj havas praktikan sperton, kio garantias privilegion de laboristoj kaj kamparanoj kaj iliaj gefiloj en ricevo de eduko. Nun pli ol 95% de la studentoj de la universitato devenas de laboristoj kaj kamparanoj.

En la pasinteco la nomita universitato estis "hereda bieno" de la burĝaro, kiu fermis sian

*Aro da diplomitaj studentoj de Kinghua-universitato volontas iri al landlimaj regionoj, kamparo kaj la lokoj, kie la patrolando plej bezonas ilin, por fari sian kontribuon al la socialisma konstruado.*





*Grafika generatoro por produkti tabulojn de grandskala integra cirkvito estas sukcese farita en kuna klopodo de studentoj kaj instruistoj de la fakultatoj de elektroniko kaj precizaj instrumentoj de Kinghua-universitato kaj laboristoj.*

pordon por laboristoj kaj kamparanoj. En la 12 jaroj de 1953 ĝis 1965 la studentoj de la konstrua fakultato devenintaj de la laboranta popolo konsistigis nur kvinonon de la tuta studentaro. Iuj el ili eĉ estis forpelitaj el la universitato pro ilia "nekapableco". En kvar jaroj antaŭ la kultura revolucio pli ol 150 gefiloj de laboristoj kaj kamparanoj estis forpelitaj el la lernejo sub diversaj pretekstoj.

Nun Kinghua-universitato praktikas la principon de Prezidanto Maŭ, ke **"eduko nepre devas servi al proleta politiko kaj nepre kombiniĝi kun produkta laboro"**, kaj funkciigas sin kun malfermita pordo, t. e. fari instruadon en fabriko, kamparo kaj armeo interlige kun la praktiko. La diplomitoj de la lastaj du jaroj plenumis sume 564 fakajn esplorajn temojn kaj gravajn teknikajn renovigojn en produktado inter kiuj triono atingis avangardan nivelon de la lando aŭ plenigis sciencan breĉon de la ŝtato. Multaj el la diplomitoj petis permeson iri al landlimaj regionoj, kamparo kaj plej malfacilaj lokoj de la patrolando kaj lokoj, kie la popolo urĝe bezonas ilin. En la pasinta jaro pli ol 300 el la pli ol 1,800 diplomitoj estis permesitaj iri al landlimaj regionoj por partopreni en tiea konstruado. Fu Kinggi, diplomito de la akvoutiliga fakultato, jam revenis al la popolkomunumo por fariĝi kamparano kaj estas nun plananta disvolvon de la brigado. Ŝi diris: "La burĝaro provas fari nin gefilojn de laboristoj kaj kamparanoj novaj nobeloj rajdantaj sur la nuko de la laboranta popolo. Mia ago ja estas rompiĝo kun la tradicia koncepto de la ekspluata klaso!"

En la pasinteco Kinghua-universitato korodis gejunulojn per la burĝaj pensoj malestimi fizikan laboron, laboristojn kaj kamparanojn kaj ĉasi

gloron kaj profiton por kulturi ilin en novajn burĝajn spiritajn nobelojn. Pri tio la instruistoj kaj studentoj montris grandan kvanton da faktoj. Iu maljuna profesoro, kiu laboris 35 jarojn en la universitato, diris: "La malnova Kinghua-universitato kulturis nur intendantojn super laboristoj kaj kamparanoj!"

Nun Kinghua-universitato pledas por kombini teorion kun praktiko kaj tre emfazas la levadon de la kapablo de studentoj en analizo kaj solvo de demandoj. Ekzemple, kunlaborante kun laboristoj-teknikistoj de iu olekampo matematika grupo de la elektronika fakultato elfaris en kelkaj monatoj novan programon de traktado de donitaĵoj por sismoesploro kaj per tio altigis la sukcesan procenton de putoborado de la petrolkampo.


En la pasinteco, sub la slogano "klereco la unua", la nomita universitato fermis siajn studentojn en la lernejo, inokulis al ili librajn sciojn apartigitajn de la praktiko kaj propagandis, ke scio estas ĉio, tiel ke studentoj serioze apartiĝis de praktiko de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de Ĉinio kaj ne povis solvi problemojn aperintajn en la produktado.

Nun Kinghua-universitato estas sub la unuigita gvido de la partia komitato. La laboristaj kadroj konsistigas 40% de la membroj de la konstanta komitato de la partia komitato. Ĉiuj gvidantaroj sub ĝi konsistas el junaj, mezaĝaj kaj maljunaj kadroj kaj estas kun partopreno de laboristoj kaj studentoj.

En la pasinteco Kinghua-universitato estis administrata de profesoroj, kiuj publike asertis ke "laboristoj ne havas voĉdonan rajton pri eduko" kaj neis la gvidadon de la Partio. Tiam la potenctenanta administra komitato de la lernejo konsistis ĉefe el profesoroj elkulturitaj de la burĝa eduka sistemo.

El starpunkto de la burĝaro tiuj kiuj persistas en la reviziisma eduka linio, atakis la edukan revolucion. Ili klopodas por restarigi ĉion de la malnova universitato. Multaj instruistoj kaj studentoj montris, ke ili tiel faras ja por ke, kiel diris Lenin, la juna generacio de laboristoj

*Kune kun laboristoj, studentoj de la velda fako de la fakultatoj de mekanika inĝenierarto de Kinghua-universitato sukcesis en veldado de ŝtalaj pecoj uzataj en malalta temperaturo.*





*Laboristino Ĝaŭ Hujling (la meza en la fronto) post sia diplomitiĝo kaj reveno al sia fabriko sukcese faris multfunkcian generatoron bezonatan de grandaj kaj mezaj elektronikaj komputeroj kune kun junaj gelaboristoj kaj per tio faris kontribuon al produktado de grandskala integra cirkvito de nia lando.*

kaj kamparanoj tie estu sklavigita de la burĝaro.

Mekanikisto Li Vanking, kiu laboris 30 jarojn en la praktika fabriko de Kinghua-universitato, estis antaŭe rigardata de la burĝaj "aŭtoritatuloj" kiel "etendita parto de maŝinbrako", kaj nun gvidas laboristojn de la universitato en studado de marksismaj kaj leninismaj teorioj, akre kritikis la esencon de la reviziisma eduka linio. Li diris: "Ĉu multaj el la ĉefoj de la reviziisma renegata kliko de Sovetunio ne estas 'ruĝaj specialistoj' elkulturitaj de universitatoj? Tamen ĝuste estas ili, kiuj turnis la unuan socialisman landon en social-imperiisman. Ni absolute ne permesas tiun historian tragedion ripetiĝi en Ĉinio!"

Pri tiu batalo iu el la respondeculoj de la partia komitato de la universitato montris: "La granda debato estas granda lukto inter la burĝaro kaj la proletaro, daŭrigo kaj profundiĝo de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj grava demando kiu koncernas tion, ĉu nia lando iru socialisman aŭ kapitalisman vojon."

Daŭre profundiĝas la granda revolucia debato de Kinghua-universitato kaj la tuta eduka fronto. La enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kiuj klopodas por renversi la ĝustajn verdiktojn, jam dronis en ekstrema izoliteco antaŭ la vastaj amasoj de la revoluciaj instruistoj kaj studentoj. Prezidanto Maŭ montris lastatempe: **"Renversi la ĝustajn verdiktojn estas kontraŭ la volo de la popolo."** La vortoj de Prezidanto Maŭ esprimis la fortan deziron de la vastaj amasoj de la revoluciaj popolanoj oponi kontraŭ restaŭro kaj persisti en daŭrigo de la revolucio. La aktuala batalo diris al ni, ke ĉiuj agoj kontraŭaj al la volo de la popolo certe malvenkos.



*Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Njemu-gubernio de Tibeto faras al elementlernejanoj edukon pri klasbatalo per akuzo de servutulmastra subpremado en la malnova socio.*



*Instruisto de Ŝibantan-mezlernejo, Hanŝoŭ-gubernio de Hunan-provinco donas al lernantoj praktikan lecionon.*

KE VEJVEN:

# Ĉaŭjang-a Agronomia

NUNTEMPE en Ĉinio disvolviĝas batalo kontraŭ reviziismo. La Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto donas fortegan rebaton al la vento de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn per abundaj fruktoj akiritaj en sia plenumado de la ĝusta principo **eduko nepre devas servi al proleta politiko kaj nepre kombiniĝi kun produkta laboro.**

Tiu ĉi novtipa socialisma agronomia instituto en Ĉaŭjang-subprovinco okcidente de Liaŭning-provinco en nordorienta Ĉinio kreis novan sperton en kulturado de studentoj kiuj tutkore servas al la vasta kamparo kaj faris siajn kontribuojn en tio.

## AL LA KAMPARO

La Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto estis parto de la antaŭa Ŝenjang-a Agronomia Instituto en granda urbo, kaj translokiĝis en montvalon de Ĉaŭjang en 1970. Nun ĝi havas sep fakojn pri agronomio, brutobredado kaj veterinara arto, fruktokulturado kaj forstumado, agra akvoutiligo, akvoutiliga konstruado, tera hidrologio kaj agrikulturaj maŝinoj, pli ol 2,000 studentojn kaj 420 instruistojn, oficistojn kaj laboristojn. Ĝis nun ĝi jam elsendis diplomitojn en tri sinsekvaj jaroj kaj starigis diversajn mallongajn kursojn kiuj kulturis nemalmultajn lokajn kamparanojn en agrikulturajn teknikistojn.

Pro kio la agronomia instituto translokiĝis de urbo al kamparo? Antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio la nomita agronomia instituto funkciis en granda urbo, ĝiaj studentoj studis en fermita ĉambro, la instruistoj kaj studentoj "terkulturis sur nigra tabulo kaj parolis pri riĉa rikolto en klasĉambro". Kvankam en la lernejo ili faris iom da scienca esploro sur malgranda kampo, tamen la fizika laboro estis farita de laboristoj, dum la instruistoj nur lekciis kaj la studentoj nur aŭskultis. Tiaj studentoj apartiĝis de la proleta politiko, de laborantaj popolanoj kaj de produkta praktiko. Studentoj kiuj studis pri grundo kaj kemia sterko tamen ne sciis kiel sterki; studentoj kiuj studis pri brutobredado kaj veterinara arto tamen ne povis kuraci malsanan bruton. Kaj tiuj studentoj ja klopodis por ĉasi pli altan pozicion en politiko kaj pli bonan vivon ol tiuj de laboruloj. Ĝuste kiel Lenin diris en sia kritiko kontraŭ la malnova eduko: **"En tiuj lernejoj la juna generacio de laboristoj kaj kamparanoj estis ne tiom edukita kiom trenita al la interesoj de la burĝaro."**

Frue en 1958 Prezidanto Maŭ jam akre kritikis tiun strangan fenomenon kaj klare montris: **"La agronomiaj altaj lernejoj ĉiuj devas translokiĝi en kamparon."** Sed, la Ŝenjang-a Agronomia Instituto same kiel aliaj agronomiaj altaj lernejoj subfosita de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki ne tiel faris.


En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la revoluciaj instruistoj kaj studentoj de la Ŝenjang-a Agronomia Instituto malkaŝis kaj kritikis la reviziisman linion antaŭenpuŝitan de Liu Ŝaŭki, likvidis liajn krimojn en subfosado de la eduka revolucio. Por rompi la superregon sole de burĝaj intelektuloj kaj transpreni la regpotencon super edukado en la manojn de la popolo, propaganda taĉmento konsistanta el laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj ĈPLA-anoj venis en la instituton kaj gvidis ĝian bataladon, kritikadon kaj reformadon. La revoluciaj instruistoj kaj studentoj senĉese altigis en la batalado sian konscion pri la bataloj inter la du klasoj kaj inter la du linioj, kaj pluapaŝe konis, ke la translokiĝo de la instituto de urbo al kamparo estas ne nur simpla translokado sed ankaŭ batalo por kritiki la reviziisman linion kaj praktiki la revolucian edukan


# Instituto – novtipa alta lernejo

linion de Prezidanto Maŭ kaj profunda socia revolucio. Sekve de tio plifirmigita estis ilia decido iri la ĝustan vojon montritan de Prezidanto Maŭ. Ili diris, ke transloki la agronomian instituton al la kamparo kaj preni la kamparon kiel la instruan bazon povas pli bone servigi la edukon al la disvolvado de nia agrikulturo, tio estas vojo irenda por socialisma agronomia alta lernejo.

En la fino de 1969, la Liaŭning-a Revolucia Komitato decidis dispartigi la Ŝenjang-an Agronomian Instituton al kamparo. Sur la sojlo de la Printempa Festo de 1970, parto de la revoluciaj instruistoj kaj studentoj de la Ŝenjang-a Agronomia Instituto, sub la konduko de la laborista propaganda taĉmento, rezolute translokiĝis al montvalo je pli ol 20 km. fore de la gubernia urbo Ĉaŭjang. Ili kaj la ĉelokaj agronomia lernejo kaj agronomia esplorejo kune formis la Ĉaŭjang-an Agronomian Instituton. Kompreneble, malmultaj oponis kontraŭ la translokiĝo dirante, ke "tiu ne estas alta lernejo" kaj ke "tio maloportunas al scienca esplorado" k.a. Tamen la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĝoje diris: "Dum multaj jaroj, agronomia instituto apartiĝis de la kamparo kaj neniom zorgis pri la agrikultura disvolvo, tamen nun vi translokiĝas al la kamparo responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ. Ni bonvenigas vin!"

*La instruistoj kaj lernantoj de la instituto iras al produkta praktiko.*





*Lernantoj de la fako de fruktokulturado kaj forstumado en lernado*

## KAMPARANO — STUDENTO — NOVTIPA KAMPARANO

Kiel funkciigi la agronomian instituton en la kamparo? Kaj kiajn studentojn ĝi devas kulturi?

En diskutado pri tiuj demandoj, kamarado Hju Ming, sekretario de la partia komitato de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto kaj unu el la respondeculoj de la malnova Ŝenjang-a Agronomia Instituto, retrorigardis pri la malbonaj sekvaĵoj kaŭzitaj de la malnova instituto funkciigita laŭ la reviziisma eduka linio antaŭ la granda kultura revolucio, kaj diris aflikte: "Tian lernejon ni neniel devas plu funkciigi. Nia Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto devas kulturi klerajn laborulojn kun socialisma konscio, laŭ la bezono de nia lando en disvolvo de socialisma agrikulturo."

Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ ke **"studentoj devas esti elektataj el la laboristoj kaj kamparanoj, kiuj havas praktikan sperton, kaj ili devas reiri al produkta praktiko post kelkjara studo en lernejo"**, la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto elektis studentojn el junaj kamparanoj de diversaj popolkomunumoj en Ĉaŭjang, kiuj posedas mezan klerecon kaj praktikan sperton (la mallongaj kursoj funkciigataj de la instituto akceptas diversaĝajn kamparanojn). La ĉefa kriterio de akcepteblaj kamparanoj kiel novaj studentoj estas ke ili volas esti kamparanoj dum la tuta vivo kaj sin dediĉi al la konstruado de nova socialisma kamparo. Post trijara lernado, la studentoj revenas al siaj propraj komunumoj. Oni nomas tiun sistemon "veno de kaj reveno al komunumo".

La starigo de tiu sistemo estas forta kritiko kontraŭ la malnova tradicia ideo "studi por esti mandareno" kaj kritiko kontraŭ la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki.

Antaŭ la kultura revolucio, la malnova Ŝenjang-a Agronomia Instituto en la urbo varbis plejparte diplomitojn el superaj mezlernejoj kiuj ne sciis agrikulturon. Kaj la studentoj nur legis librojn sen praktikado. Kvankam la instituto funkciis dekkelkajn jarojn kaj elsendis sep mil diplomitojn, tamen nemalmultaj el ili ne volis labori en kamparo sed preferis sin okupi pri aliaj laboroj en grandaj urboj. Malmultaj el ili laboris kiel teknikistoj en guberniaj urboj kaj nur tre malmultaj laboris en kamparo. Unuvorte la antaŭaj diplomitoj de la instituto plejparte ne okupiĝis pri agrikulturo, kaj eĉ tiuj kiuj okupiĝis pri agrikulturo tamen ne sciis ĝin. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne bonvenigis tiujn studentojn nek volis sendi siajn gefilojn al tia instituto.

Nun, la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto praktikas la sistemon "veno de kaj reveno al komunumo". Tio estas profunda reformo al varba kaj distribua sistemo. Je la komenco iuj deman-

dis dubeme: "Kiu volas esti studento, se li ankoraŭ devas esti kamparano poste?"

Ĉu oni volas tion aŭ ne? La kelkjara praktiko pruvis, ke malmultaj kiuj prenas la instituton kiel ŝtuparon por forlasi kamparon kaj suprengrimpi vere ne volas veni. Sed la vasta amaso de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj varme laŭdis tian faron. Je ĉiu varbado, ĉiuj komunumoj kaj produktaj taĉmentoj rekomendis siajn plej elstarajn gejunulojn al la instituto, iuj eĉ klopodas por alsendi kiel eble plej multe da junuloj al la instituto, tiel ke la novaj studentoj ĉiujare atingis la planitan nombron.

Tiuj studentoj el kamparanoj antaŭ ĉio ricevas bonan ideologian edukadon kaj studas pri agronomiaj scienco kaj tekniko. En la malnova Ŝenjang-a Agronomia Instituto, tuj post kiam la novaj studentoj alvenis, la instanco jam kuraĝigis ilin klopodi por esti famuloj kaj specialistoj. Nun, en la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto, tuj post kiam la novaj studentoj alvenis, la instanco studigas al ili revolucian teorion de Marksismo kaj la penson de Prezidanto Maŭ pri eduka revolucio, disdonas al ili laborajn instrumentojn kaj postulas ke ili konservu kaj disvolvu la naturon de laboranta popolo. Por helpi studentojn starigi proletan mondkoncepton, persisti pri la fundamenta linio de la Partio, persisti en la socialisma vojo, la instituto revenigis la studentojn al iliaj propraj komunumoj kaj produktaj taĉmentoj en difinita tempo por partopreni tie en klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado, en praktikado de lerno de Daĝaj en agrikulturo, por ke ili kreskigu sian kapablon en amasa batalo.


Nun, 340 diplomitoj de la instituto jam revenis al siaj propraj komunumoj kaj produktaj taĉmentoj, iuj el ili fariĝis kadroj, aliaj teknikistoj kaj triaj kamparanoj. Ili ĉiam laboras kune kun kamparanoj kaj ricevas rekompencon same kiel la lastaj, kaj pro tio ili estas varme bonvenigataj.

## KOMBINIĜO DE EDUKO KUN SCIENCA ESPLORO KAJ PRODUKTADO

Multaj vizitantoj estis forte impresitaj de tio, ke la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto estas kaj lernejo kaj scienca institucio kaj produkta taĉmento. La instruistoj kaj studentoj de ĉiu fako mem starigis sian edukan, sciencesploran kaj produktan bazon ligante la karakterizaĵojn de sia fakultato kaj la loka produktado. Ĉiuj ili estas kaj studentoj kaj kamparanoj kaj sciencesplorantoj. La studentoj fizike laboras kaj samtempe lernas, kaj la instruistoj fizike laboras kaj samtempe instruas.

En la eduka revolucio la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto renovigis la malnovan instruan enhavon kaj diversmaniere funkcias kun malfermita pordo, tio portis viglecon al la instituto. Instruistoj kaj studentoj diris, ke la malnova Ŝenjang-a Agronomia Instituto, por kulturi la

*La instruistoj kaj lernantoj de la fako de brutobredado kaj veterinara arto fizike laboras en produkta bazo.*





*Post reveno al kamparo la diplomitoj de la instituto ludas aktivan rolon tiel en la revolucio kiel en la produktado.*

ne havas rilaton kun speciobredo kaj pli detale lekcias tion kio havas striktan rilaton kun ĝi. Tial, ĉio kion la nunaj studentoj lernas estas scioj vere bezonataj por la produkta praktiko.

La regiono de Ĉaŭjang estis ofte atakata de sekegeco kaj ventego, kaj tre malalta estis ĝia hektara produktokvanto de greno. En la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo, la komunumanoj decidis reformi la naturon kaj levis ardan produktan tajdon. La instruistoj kaj studentoj de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto pensas kion pensas la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, rigardas tiun ĉi malfacilan kaj gloran taskon kiel sian kaj klopodas por kombini la instruadon kun scienca esploro kaj produktado por servi al la loka agrikultura produktado. Ili starigis akvoutiligan kurson en akvomanka loko kaj kurson pri kulturado de bonaj semoj en loko kie mankas bonaj semoj, kaj kreis kampon speciale por kulturi bonspeciajn plantojn. La instituto starigis sep sciencajn kaj instruajn bazojn en kamparo por ke la instruistoj kaj studentoj tie akceptu reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj fondis taĉmentojn de scienca eksperimento por diskonigi agronomiajn sciojn. La instruistoj kaj studentoj kaj la kadroj de produktaj taĉmentoj kaj komunumanoj kune laboris, kune terkulturis per sciencaj metodoj, reformis kulturan teknikon kaj flegis fruktarbojn. Dank' al tio en la jaro, kiam la instituto translokiĝis tien, ili jam faris sian kontribuon por grandigi la lokan agrikulturan produktokvanton.

"altkvalitajn" studentojn, starigis multajn fakojn kaj kompleksajn lernobjektojn kiuj serioze sin apartigis de praktiko. Tiam oni lekciis ne pri la flava sablogrundo de la loko sed nur pri grundo de fremda lando per multe da tempo; parolante pri botanika klasifiko, oni multe lekciis pri la origino de alilokaj floroj kaj arboj. Nun, la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto ĝisfunde reformis tiun instruan enhavon, rearanĝis la strukturon de fakoj kaj forigis la nenecesajn lernobjektojn kaj instrumaterialojn. Ni prenu la agronomian fakon kiel ekzemplon. Antaŭe ĝi havis pli ol 30 lernobjektojn, nun ili forigis iujn nenecesajn objektojn kaj kunigis tiujn lernobjektojn kiuj havas interrilaton, kaj nun havas nur 8 lernobjektojn. Tio multe plialtigis la instruan efikon. Lekciante pri genetiko en la pasinteco, instruisto lekciis ekde ĝia origino kaj evoluo, kaj tio konsumis multe da tempo. Nun oni lekcias tion en lecionoj pri teorio de speciobredo. Oni forlasas tion kio

## "PLURFOJAJ VENOJ KAJ REVENOJ"— NOVA INSTRUA METODO

La ĉefa aranĝo farita de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto en sia reformado de la eduka sistemo kaj edukaj metodoj estas "plurfojaj venoj kaj revenoj".

"Veno" signifas ke la studentoj venas al la instituto por studi, kaj "reveno" signifas ke ili revenas al siaj propraj produktaj taĉmentoj por tie studi kaj samtempe praktiki por unuigi la lernitan teorion kun la praktiko. Ni prenu la agronomian fakon kiel ekzemplon. La unuaklasaj studentoj lernas ĉefe en la instituto, la duaklasaj revenas al siaj propraj produktaj taĉmentoj por tie praktiki la lernitaĵojn je sep monatoj kaj la triaklasaj tutjare studas kaj faras praktikadon en scienca kaj instrua bazo. En la jarkomenco ili venas al la produkta taĉmento por helpi ĝin en faro de produkta plano kaj scienceksperimenta plano; en la tempo de printempa semado ili venas al la taĉmento kunportante bonspeciajn semojn por starigi tie kurson de printempa semado kaj kampa flegado kaj partopreni en la printempa semado; somere, kune kun komunumanoj ili faras artan polenadon al la bonspeciaj plantoj kulturataj sur kampo, preventas kaj eliminas fiinsektojn kaj plantajn malsanojn kaj faras kampan flegadon, kaj en aŭtuna rikolto, ili kolektas en la produkta taĉmento eksperimentan materialon, faras al ili sintezan analizon por resumi la sperton de amasoj pri riĉa rikolto kaj aktive partoprenas en aŭtuna fizika laboro. Dum la studentoj laboras en sia produkta taĉmento, la instruistoj faras kontroladon kaj direktadon en difinita tempo. Post reveno al sia lernejo, ili faras resumadon pri ideologio kaj faka scio.

Praktikante tiun metodon, la studentoj ĉiam povas teni rilatojn kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj kiel ordinara komunumano ili partoprenas en produkta laboro kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tiamaniere, studento estis komunumano antaŭ vizito de la instituto, estas komunumano dum la lernado kaj estos ankoraŭ komunumano post la diplomitiĝo. Tio kreis favorajn kondiĉojn por eduki la studentojn ami la kamparon kaj fikse loĝi en ĝi kaj fortigi iliajn rezolutecon kaj memfidon en reformado kaj konstruado de la kamparo.

Tiu metodo akcelis la kombinon de eduko kun produkta laboro, pli bone unuigis la teorion kaj la praktikon, rompis la instruan ordon de malnovaj agronomiaj altaj lernejoj "fundamenta kurso — speciala fundamenta kurso — speciala kurso", ŝanĝis la antaŭan instruan metodon "lerni kion oni ne uzas" kaj "ne lerni kion oni uzas", kio estas serioze apartigita de praktiko. Laŭ la marksisma teorio pri konado ili unue okazigis specialan kurson por iom post iom teoriigi la lernitaĵojn de la studentoj en praktiko. La lekcio pri kulturado de plantaĵoj antaŭe estis farata en speciala kurso, tamen nun tio okazas en la unua klaso. Kaj la lernado kombiniĝas kun produkta laboro por ke la studentoj posedu praktikan scion, kaj poste aldoniĝas la lekcio de la fundamenta teorio pri botanika fiziologio. La fakto pruvas, ke tia metodo pli bone efikas ol la antaŭa nura instruado en klasĉambro.

Dank' al tiu metodo la studentoj povas fari multajn kontribuojn al agrikulturo jam en sia lernado. En 1975 la dua- kaj tria-klasaj studentoj de la fakultatoj de agronomio, fruktokulturado kaj forstumado, brutobredado kaj veterinara arto organizis 56 sciencajn eksperimentajn taĉmentojn kun partopreno de studentoj kaj komunumanoj, starigis pli ol 340 diversajn mallongajn kursojn kaj kulturis pli ol 6,600 kamparajn teknikistojn post reveno al siaj propraj produktaj taĉmentoj. La agronomia fakultato kulturis pli ol 700 hektarojn da scienceksperimentaj kampoj, la fakultato de fruktokulturo kaj forstumado helpas produktajn taĉmentojn konstrui 52 novajn fruktoĝardenojn kun areo de pli ol 500 hektaroj, planti pli ol 134,000 fruktarbojn, grefti 138,000 fruktarbojn kaj la fakultato de brutobredo kaj veterinara arto kuracis pli ol 2,100 malsanajn brutojn por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

La "veno de kaj reveno al komunumo" estas direkto kaj "plurfojaj venoj kaj revenoj" estas ponto. Pri tio ofte parolas la studentoj. Ĉar tio esprimas ilian decidon iri la ĝustan vojon de eduka revolucio direktata de Prezidanto Maŭ kaj senĉese klopodi por novaj sukcesoj.

# Vang Dahjue en scienca esplorado

de **LUO CAŬ**

VANG Dahjue (dahjue signifas en la ĉina lingvo studenton) estas kromnomo de 57-jara malriĉkamparano Vang Gujbin. En 1971, kiam la cirkulero pri varba regularo de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto estis sendita al lia hejmloko, Ĝasajjingzi-brigado de Vanŝoŭ-komunumo, Gianping-gubernio, Vang Gujbin tre ĝojis de tio kaj rapidis al la brigada oficejo por sin anonci por viziti la lernejon. Li diris: "La instituto varbas spertulojn en agrikultura produkto kiel siajn studentojn, tio konformas al mia deziro." Iu opiniis ke li ne taŭgas por tio en tri flankoj, nome: malalta klereco, granda aĝo kaj malforta korpo. Li tamen diris: "Kvankam mi ne taŭgas en tio, tamen mi amas la kolektivon kaj mi lernas sciencon kaj teknikojn por disvolvi la socialisman agrikulturon kaj konstrui novan kamparon, tio konformas al la regularo de la varbado."

Vere ĝusta estas lia diro. Lia varma amo al la kolektivo estas fame konata tra la brigado. Antaŭ kelkaj jaroj, la supera instanco alvokis, ke oni kulturu kotonon kaj la komunumanoj estis tre fervoraj en tio. Tamen la senprujna periodo de tiu ĉi loko estas mallonga kaj plue al la komunumanoj mankis sperto kaj teknikistoj, tial la produktokvanto de kotono estis malalta. Tio tre maltrankviligis Vang Gujbin. Ĝuste por bone kulturi kotonon li sin anoncis por viziti la instituton.

Vang Gujbin finfine fariĝis studento de la instituto. Post kiam la novaĵo disvastiĝis tra la brigado kaj la komunumo, oni ŝerce kromnomis lin Vang Dahjue.

La instrua metodo de la kotona kurso en kiu lernis Vang Dahjue estas tia: Post perioda lernado en la kurso, la lernantoj devas reveni al sia brigado por fari periodan praktikon. La tuta lernotempo estas unu jaro, kiu konsistas el tri lernoperiodoj. Post aŭtuna rikolto jam finiĝis la kurso.

Vang Dahjue lernis tre entuziasme kaj diligente. Li havas praktikan sperton, sed en la pasinteco li ne povis analizi ĝin per teorio. En la kurso kombinante la sperton kun la teorio, li trovis multajn demandojn. Li estis la plej demandema lernanto en la kurso. Vespere, se instruisto aŭdis frapon je la pordo, li tuj divenis, ke alvenis Vang Gujbin por prezenti demandojn.

Vang Dahjue estis bona lernanto de la instituto tiel en lernado kiel en moralo.

Post la unua lernoperiodo li revenis al sia brigado kaj fondis sciencan eksperimentan grupeton. Konsentite de la gvidantoj kaj la komunumanoj la grupeto tiujare kulturis 50 muojn da kotonplantoj laŭ la nova metodo lernita de Vang Dahjue en la kurso.

Fininte sian lernadon de la dua periodo en la instituto, li revenis al sia brigado en iu vespero. Vidante lin plena de gaja humoro, lia edzino diris al li: "Vi ankoraŭ ĝojas! Oni neniel povas ekstermi la afidojn en via kotona kampo!" Li estis surprizita de la informo, kaj malgraŭ laciĝo de la tuttaga vojirado li tuj iris al la kotona kampo kun lampo en la mano kaj faris kontroladon al la kotonarbetoj unu post alia ĝis tagiĝo.

Frumatene, alvenis la gekamaradoj de la scienca eksperimenta grupeto kaj diris al li: "Post via lastfoja foriro, ni jam komencis ŝprucigi insekticidon, sed neniel povis ekstermi la afidojn!"

Vang Dahjue demandis pri la ŝpruciga tempo kaj la uzita insekticida kvanto, kaj observadis surkampe. Li pensis en si: Matene multas roso, tio maldensigis la ŝprucigitan insekticidon kaj nature malpliigis ĝian efikon. Vespere la kotonaj folioj kliniĝis, tial ŝprucigita insekticido ne povis atingi folian dorson, kaj ankaŭ tio reduktis la efikon. Tiuj du fenomenoj eble estas la ĉefaj kaŭzoj de ilia malsukceso en ekstermado de afidoj. Dum lernado pri prevento kaj ekstermado de afidoj, la instruisto diris, ke oni ne devas ŝprucigi insekticidon en tagmezo, ĉar tagmeze estas varme, la ŝprucigitaĵo vaporiĝas rapide kaj ofte venenas ŝprucigantojn. "Se homoj povas esti venenitaj, ĉu afidoj ne? Se ni ŝprucigos insekticidon tagmeze, certe bona efiko montriĝos."

Post interkonsiliĝo Vang Dahjue kaj membroj de la grupeto decidis ŝprucigi insekticidon tagmeze, kaj samtempe bone sin gardi de veneno. Jen la tuta brigado sin ĵetis al la laboro. Ĉiu

*Vang Gujbin (maldekstre) en studado de teorio pri la diktaturo de la proletaro*



komunumano ŝprucigis insekticidon nur al du sulkoj da kotonplantoj kaj fininte tion tuj foriris. Per tia metodo ili ekstermis ĉiujn afidojn en du tagmezoj. En tiu jaro la mua produktokvanto de sensemigita kotono de la brigado atingis 53.5 kg. kaj pli-ol-3-obligis la antaŭan produktokvanton. Per tio ili kreis novan rekordon de mua kotona produktokvanto en la gubernio. Vidinte tiun grandan sukceson, la komunumanoj ĝoje diris: "Ni ne vane sendis Vang Dahjue viziti la instituton, li estas vere kapabla!"

En 1972 Ĝasajjingzi-brigado suferis de printempa sekegeco, elteriĝis ne ĉiuj sorgaj plantidoj, kaj maje prujna frosto atakis tiun lokon, la vakanteco de sorgaj kampoj fariĝis pli serioza. La plagoj ne deprimis tiun kamparanonstudenton. Li alprenis novan metodon de transplantado de sorgaj plantidoj. Tiu metodo estas frukto akirita de li en 1971 en eksperimentado. Tiam li prenis du sulkojn da sorgaj plantidoj por fari eksperimentadon: La sorgoplantidoj de unu sulko estis netransplantitaj kaj tiuj de alia sulko transplantitaj. Rezulte de tio, la transplantitaj havis malaltajn kaj dikajn tigojn kaj la sorgaj grajnoj estis pli bonkvalitaj, dum la netransplantitaj kreskis multe malpli bone ol la transplantitaj. Li trovis ke la netransplantitaj plantoj havis relative longajn ĉefradikojn, sed la branĉaj radikoj estis malfortaj; la ĉefradikoj de la transplantitaj estis rompitaj kaj relative mallongaj, sed la branĉaj radikoj estis fortikaj, kiuj povas sorbi pli da nutrajo en grundo. En 1972, dank' al la transplantado tiu brigado akiris riĉan rikolton de sorgo, malgraŭ atako de printempa frosto kaj somera sekegeco.

Aŭtune de 1973 la kotonkampoj estis kovrataj de verdaĵoj, kies branĉoj surportis multajn kotonfruktojn. La riĉa rikolto estis jam videbla. Je la dua de aŭgusto, kiam oni ĵus finis tagmanĝon, subite nigra nubaro ekkovris la ĉielon, kaj ekhajlis. Multaj kotonfruktoj estis batfaligitaj surteren.

Tuj post la ĉeso de la hajlo, Vang Dahjue kaj aliaj komunumanoj kuris en koto al la kampoj. Li kunvenigis surkampe kamaradojn de sia scienca eksperimenta grupeto por trovi rimedojn kontraŭ la hajla plago.

Apenaŭ finiĝis ilia kunveno, tien rapidis la partia sekretario de la komunumo Ĝuĉjo.

Ĝucjo demandis Vang Dahjue: "Kiajn rimedojn vi alprenos por savi la plagitajn kotonplantojn?" La lasta diris al li rimedojn elpensitajn de la scienca grupeto. Ĝuĉjo tre emociiĝis kaj pensis en si, ke tiu maljuna malriĉkamparano, kiu lernis en la instituto nur mallongan tempon, jam povas prezenti efikajn rimedojn por venki la plagon. Tio ja pruvis la ĝustecon de la revolucia eduka linio de Prezidanto Maŭ.

Sekvantan tagon, la komunumo kunvokis kunvenon en Ĝasajjingzi-brigado, en kiu Vang Dahjue prezentis sperton de ilia brigado. Oni alprenis efikajn kontraŭrimedojn sur ĉ. 70 hektaroj da kotonkampoj de la tuta komunumo laŭ lia propono, kaj rezulte de tio la perdo kaŭzita de la plago estis multe reduktita.

En 1974, 55-jara malriĉkamparano kaj diplomito de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto Vang Dahjue estis elektita kiel sekretario de la brigada partia filio pro liaj elstaraj faroj. Li profunde konis, ke li havas iom da kono pri klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento kaj estas konfidita de la kamaradoj, tion li devas ŝuldi al la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto, kiu rezolute plenumas la proletan edukan linion de Prezidanto Maŭ, kaj en kiu li lernis Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson kaj sciencan-teknikan scion, altigis sian politikan konscion kaj komprenis ke nur socialismo povas savi Ĉinion. Por rapide ŝanĝi la postiĝintan fizionomion de sia hejmloko, li energie faris revolucion en la brigado kaj fondis politikan vesperlernejon kaj agronomian kolegion, por kulturi novajn homojn por la socialisma konstruado.

En 1975 lia produkta brigado levis sian produktokvanton de greno de 35,000-40,000 kg. en la pasinteco al 145,000 kg. Lia brigado planis konstrui memfluan irigacian kanalon kaj du etajn akvokonservejojn, kiuj povas irigacii du trionojn de la agroj de la tuta brigado. Ili klopodas por konstrui en mallonga tempo la lokon en Daĝaj-tipan novan kamparon.

# Mi venis vere al la kamparo inter terkulturistoj

de GONG GIDAŬ

RESPONDE al la alvoko de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ pri transloko de altaj agronomiaj lernejoj al kamparo, nia agronomia instituto translokiĝis de granda urbo en montvalon. Ŝanĝiĝis la medio kaj la kondiĉoj, kaj aperis multaj malfaciloj, el kiuj la plej grandaj problemoj estas: kiel fari instruadon kaj sciencan esploradon? Tion plej multe prizorgas ĉiu eduka laboranto. Mi devas konfesi, ke mi tiam estis tre maltrankvila pri tio.

Ĝis nun ni funkciigis tie la instituton jam ses jarojn. Dume mi propraokule vidis, ke vivecplenaj studentoj finstudinte en nia instituto arope iris al kamparo, kaj la instruistoj kaj studentoj de la instituto faris sciencan esploradon kune kun komunumanoj kaj rikoltis fruktojn. Tial hodiaŭ mi povas paroli pri tiu problemo kun aparte facila koro.

Mi estas intelektulo deveninta de la malnova socio. Antaŭ la Liberiĝo, mi estis profesoro de Fudan-universitato en Ŝanhajo. Post la Liberiĝo, mi laboris en la Agronomia Instituto de Ŝenjang ekde 1952. En 1970, la instituto translokiĝis de la granda urbo Ŝenjang al Ĉaŭjang en la okcidenta montregiono de Liaŭning kaj mi tien iris kun la instituto. De tiam la instituto alprenis la nomon Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto.

En la komenca periodo post nia alveno al la montregiono, mia familio ne povis alkutimiĝi al la tiea vivo. Eĉ havigo de akvo kaj preparo de manĝaĵo estis ne tiel facila kiel en urbo. Iafoje estingiĝis la forno, la brulherboj kaj ligno malsekaj ne volis bruli plenigante la ĉambron per fumo kaj ni ne povis finprepari manĝon en du-tri horoj. Miaj pensoj kaj sentoj estis diferencaj de tiuj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ili sin tenis tre ĝentile kontraŭ mi kaj mi ne havis komunajn vortojn kun ili. En la komenco, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj titolis min per "instruisto Gong", kio malplaĉis al mi. En la pasinteco, oni nomis min "profesoro Gong" en Ŝanhajo kaj Ŝenjang, sed ĉi tie oni nomis min "instruisto", ĉu tio ne signifis malaltiĝon de mia socia pozicio? Tiam akra batalo ekzistis en mia penso. Kion fari? Mi denove studis instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri ideologia remuldo de intelektuloj. Prezidanto Maŭ diris: **"La definitiva dividlinio inter la revoluciaj, nerevoluciaj kaj kontraŭrevoluciaj intelektuloj estas tio, ĉu ili volas kaj efektivigas kombiniĝon kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj."** La instruo de Prezidanto Maŭ montris al mi, ke la supre menciitaj pensoj esence spegulas mian starpunkton kaj pruvis, ke mi ankoraŭ ne bone solvis la problemon al kiuj servi, kaj mi sentis ke mi nepre devas lerni de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por tute forĵeti la burĝan mondkoncepton.

En kontaktado kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, mi vidis propraokule, kiel ili batalas kontraŭ la naturo kaj faras socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon, penege laborante kaj ŝvitegante, por reformi la patrolandon kaj ŝanĝi la fizionomion de la hejmloko. Ili luktadis senlace kontraŭ malfaciloj dum dekoj da jaroj. Kiel granda estas la diferenco inter mi kaj ili! Tiam ekŝanĝiĝis mia penso. Kvankam nia vivo iom malfaciliĝis,

tamen mi sentis ĝojon en la koro ke mia laboro estas en servo al la popolo. Por helpi la komunumon kaj produktajn taĉmentojn en produkto de semoj de hibridaj sorgo kaj maizo, mi ofte iris al produktaj taĉmentoj por ekzameni la kreskadon de gepatraj plantoj sur la kampoj. Foje kiam mi ekzamenis la semproduktajn plantojn de Hiŝan-taĉmento malproksime de nia instituto, mi trovis ke la kreskado de la patrinplantoj en iu kampo estas tro malfrua, kaj interkonsiliĝis ĝustatempe kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por solvi la problemon. Kiam mi ree iris tien en aŭtuno, la maljuna taĉmentestro diris emocie tenante mian manon: "Se vi ne venus al ni lastafoje, tiu kampo estus jam fiaskinta". La vorto de la maljuna taĉmentestro longe restis en mia memoro. Ĝi estis por mi kuraĝigo kaj ankaŭ stimulis min al pli bona servado al la popolo.

Ni instruistoj kaj studentoj de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto fondis vesperan politikan lernejon kaj diversajn teknikajn kursojn mallongtempajn aŭ migrantajn por propagandi la politikojn de la Partio kaj disvastigi agronomiajn teknikojn al la komunumanoj. Tiaj kursoj estis varme akceptataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kaj la komunumanoj ne plu nomis min "instruisto Gong", sed "maljuna Gong" kun intima sento. Tio ĝojigis min, ĉar mi pli intimiĝis kun ili.

Dum dekoj da jaroj en eduka laborado mi alkutimiĝis al malnovaj instruaj sistemo kaj metodo. Nun laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ke eduko devas servi al la proleta politiko kaj kombiniĝi kun produkta laboro, la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto praktikis la novajn principojn en sia eduka laboro, nome akcepti studentojn el kaj resendi ilin post finstudo al komunumoj, kaj dum la studa periodo la studentoj de tempo al tempo reiras al sia respektiva produkta taĉmento por praktiki la lernitajn sciojn. En la komenco mi havis multajn demandojn pri tio. Mi pensis, ke alta lernejo devas havi aspekton indan al sia nomo, sed tiam la instituto havis nek konvenajn domojn, nek sufiĉe multajn profesorojn kaj lektorojn, nek bonajn bibliotekon, laboratorion ktp. Kiel oni povas nomi tian kiel altan lernejon? Kaj krome, la studa periodo estis mallongigita kaj la instruaj objektoj estis reduktitaj, kiel do oni povos elkulturi altkvalitajn studentojn? Laŭ mia opinio, ju pli longa estas la instrua periodo, ju pli multaj estas la studitaj verkoj, ju pli malfacilaj estas la studaĵoj, des pli bone. Aldone la studentoj devas lerni unu aŭ du fremdajn lingvojn kaj antaŭ la diplomitiĝo verki disertaĵon kun alta nivelo. Nur tiel povas esti nomata alta lernejo kaj nur en tiaj lernejoj la studentoj povas esti vere "altkvalitaj". Kiam mi laboris en la Agronomia Instituto de Ŝenjang, tie estis fako pri kulturo de bonaj specioj kies 4-jara studperiodo estis longigita ĝis 5 jaroj kaj kies studobjektoj multiĝis de pli ol 30 al pli ol 40. Kaj krome mi aparte aldonis al ĝi pluan studobjekton de biologio de fekundigo, opiniante ke nur tiamaniere la lernejo vere meritas la nomon "alta".

Fakte, tia opinio estas tute erara, tia lernejo disiĝas de la politiko kaj la realo kaj devigas la studentojn nur fariĝi librovoraj vermoj. La malnova instrua vidpunkto pure estas produkto de subjektiva ideismo.

La sesjara praktikado de lerneja laboro en kamparo finfine korektis miajn eraran opinion kaj agmanieron kaj mi ekvidis, ke la vojo de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto estas la ĝusta vojo por kulturi agronomiajn teknikistojn bezonatajn de nia lando.

Kiaj do povas esti nomataj "altkvalitaj studentoj"?

Pro venenado de la kontraŭrevolucia reviziisma eduka linio de Liu Ŝaŭki, plejparto de la studentoj elkulturitaj de la malnova Agronomia Instituto de Ŝenjang dum pli ol 10 jaroj antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio restas en urbo, kaj nur tre malmultaj el ili iris al la kamparo. Se studentoj de agronomio ne amas agrikulturon nek okupiĝas pri ĝi, ĉu tiaj studentoj povas esti nomataj altkvalitaj?

Sed la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto iras tute alian vojon. Ĝi lokiĝas en la kamparo, ĝiaj studentoj devenas de kaj reiras al komunumoj post diplomitiĝo, ĝiaj studobjektoj kaj sciencesploraj temoj estas deciditaj en kombino kun la reala produktado, en instruado ĝi lasas la studentojn plurfoje reiri al sia propra produkta

taĉmento por praktiki la lernitajn sciojn. Kun arda volo por konstrui la novan socialisman kamparon de la patrolando la studentoj venas lernadi, dum lernado ili strikte ligiĝas kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj fininte la studadon ili reiras al la kamparo por okupiĝi pri agrokulturado. Kial tiaj studentoj ne povas esti kalkulataj kiel studentoj? Ili ja estas studentoj vere bezonataj de la nova Ĉinio, kiuj kombinas la studon kun la praktiko kaj tuj praktikas kion ili ĵus lernis kiel laboruloj kleraj kun socialisma konscio. Kiel ekzemplon mi prenu studenton Jang Hiaŭmin. La hektara produktokvanto de tritiko de lia hejmloko restadis je ĉ. 2.25 tunoj de multaj jaroj. Kiam li eniris en la instituton en 1972, li forte deziris altigi la produktokvanton de tritiko de sia hejmloko. Li atente studis ĉiujn studobjektojn, aparte detale pri plantado de tritiko, kaj krome li faris penetran esploradon en ligo kun la naturaj kondiĉoj de sia hejmloko. Antaŭ lia diplomitiĝo, la eksperimenta parcelo kulturata de li en la hejmloko akiris bonan rikolton de 4.2 tunoj da tritiko hektare kaj en la sekvanta jaro, la meznombra hektara produktokvanto de tritiko kulturita laŭ lia sperto en granda areo atingis 6 tunojn. Nun la tuta gubernio de lia hejmo disvastigis lian kulturan teknikon de tritiko. Jang Hiaŭmin eble ne legis tiel multe da libroj kiel la studentoj de la malnovaj agronomiaj altaj lernejoj, tamen ĉu oni povas diri, ke tia studento estas de malalta kvalito? En tritika kampo li klarigis al vizitantaj komunumanoj, instruistoj, studentoj kaj specialistoj pri la tuto de siaj kulturaj teknikoj de tritiko, kombinante teorion kun la lokaj naturaj kondiĉoj. Ĉu tio ne estas pli altkvalita ol disertaĵo kun dekmilo da vortoj sed sen rilato al la realo?


Vidante ke multaj studentoj similaj al Jang Hiaŭmin ludas gravan rolon sur agrikultura fronto, mi sentas koran ĝojon kaj samtempe mi ricevas edukon en tio.

Kiamaniere tiaj studentoj estas kulturitaj? Ne dank' al profesoroj kiel mi, sed al la socialisma sistemo de nia lando, al la gvido de la Partio kaj la proleta eduka linio de Prezidanto Maŭ.

La studentoj de la malnovaj agronomiaj institutoj havis mankon, ke ilia studado ne kombiniĝis kun la produkta praktiko, akirinte sciojn el libroj ili povis nur paroli sed ne praktike fari kaj montras sin senhelpaj alfrontante konkretajn problemojn en produktado. La studentoj de nia Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto povas ludi rolon de spino en produkta laboro de taĉmento kaj ankaŭ studentoj nediplomitiĝintaj povas solvi problemojn en produktado. Ekzemple Liu Guangji, studento de la agronomia fako, trovis dum sia studado jam novan metodon de semado por garantii senmankecon de plantidoj en arakidaj kampoj kaj solvi la problemon, ke en la regiono de Ĉaŭjang ofte okazas sekeco en printempo kaj estas malfacile teni senmanke arakidajn plantidojn. Studento Liu Ĵong provis kulturi rizon laŭ scienca metodo en sia hejmloko, kie la senprujna periodo estas mallonga kaj oni neniam kulturis rizon antaŭe, kaj akiris riĉan rikolton de 7.5 tunoj meznombre en ĉiu hektaro. Al ĉiuj komunumanoj estas bonvenaj tiaj studentoj.

La Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto kombinas instruadon kun produktado kaj scienca esplora-

*Maljuna profesoro Gong Gidaŭ en lernado de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.*



do. La sukcesoj de Liu Guangji kaj Liu Ĵong estas akiritaj dank' al tia nova instrua metodo. Mia timo pri manko de laboratorio kaj forcejo en la pasinteco, montriĝis tute superflua. La fakto pruvis, ke ne nur eblas fari esploradon tie, cetere estas multe da temoj atendantaj nian esploradon. Antaŭ mia alveno al Ĉaŭjang, mi aŭdis multfoje, ke la hibrida sorgo JZ 5 estas altprodukta, tamen ne bongusta. En tiu tempo mi loĝis en urbo kaj neniam manĝis tian sorgon, sed post kiam mi venis al la kamparo kaj prenis saman manĝaĵon kun la komunumanoj, mi pli klare kaj profunde spertis tion. Se mi kiel kulturanto de sorgosemo ne povus plenumi la postulon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, mi vanigus la esperon, kiun ili metas sur min. En la lastaj jaroj, estis formita esplora grupo el instruistoj kaj studentoj taskita por speciale esplori sorgon. Ni jam elkulturis kelkajn sterilajn kaj refekundigajn speciojn kaj ties hibridojn, kiuj estas altproduktaj kaj bongustaj.

En la pasintaj ses jaroj, la instruistoj kaj studentoj de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto jam akiris sukcesojn kune kun lokaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en pli ol 20 eroj de scienca esploro, inter kiuj estas novaj specioj de milio kaj kotono, eltrovo de natura malamiko *Litomastix heliothis* kiu povas ekstermi la insekton *Heliothis armigera* malutilan al kotono kaj rimedo kontraŭ fiinsekto de kotono *Phytoscaphus gossypii.*

Vizaĝe al tiuj sukcesoj en scienca esploro ni ofte rememoras pri la scienca esplorado en la malnova agronomia instituto. Tiutempe nur malmultaj personoj okupiĝis pri esplorado solece en la laboratorio en atmosfero tute malvigla kaj prema, por ne paroli pri tio ke la esplorataj temoj havis nenian rilaton kun la produkta praktiko. Kvankam tiam mi tuttage faris eksperimentojn kun studentoj-esplorantoj en forcejo ĉirkaŭ potoj, tamen tre malmultaj estis niaj atingoj. Nun en la esplorado partoprenas ne nur la instruistoj kaj studentoj de nia instituto, sed ankaŭ komunumanoj, kaj en la regiono de Ĉaŭjang ardas vigla amasa aktivado de scienca esplorado kaj scienca kulturado de kampoj. Ne nur en la instituto sed ankaŭ en multaj vilaĝoj troviĝas laboratorio. Estis vere ridinde, ke antaŭe mi maltrankviliĝis pro manko de laboratorio. Se ne estus la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kiu kondukis nin al la vojo de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto, kiel ni povus atingi la nomitajn sukcesojn!

En la 6 jaroj pasigitaj en Ĉaŭjang, mi kiel agronomo vere ekvivis inter kamparanoj. Mi sentas min tre feliĉa, ke mi fine dum miaj kadukaj jaroj solidare kaj intime vivas kaj laboras kun vastaj amasoj de kamparanoj, kiuj estas miaj veraj instruistoj kaj donis al mi riĉajn sciojn pri klasbatalo kaj produkta batalo. Sub ilia stimulado mi iom post iom remuldas mian burĝan mondkoncepton kaj de ili mi ricevis helpojn kaj atentemajn prizorgojn ne nur en miaj instruado kaj scienca esplorado sed ankaŭ en vivado. Tio estas tre dankinda por mi. Nun mi jam havas aĝon de pli ol 60 jaroj, sed sur la vojo de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto mi nur faris la unuan paŝon. Nun mi estas faranta esploradon por altigi la nutrajn substancojn de grenoj kaj mi irados laŭ tiu vojo por kontribui pli multe en instruado kaj scienca esplorado.


## ENCIKLOPEDIETO

### Funkciigi lernejon kun malfermita pordo

Estas figura esprimo, signifanta funkciigon de lernejo en ligo kun la praktiko de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado en la socio. Ĝi estas unu el la gravaj reformoj en la eduka revolucio faritaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj ŝanĝis la staton de la malnovaj lernejoj kiuj apartigas edukadon de la proleta politiko, de la laboristoj kaj kamparanoj kaj de la produkta praktiko. La reformo estas utila por kulturi la lernantojn en klerajn laborulojn kun socialisma konscio.

Kaj "fari sciencan esploradon kun malfermita pordo" signifas fari sciencan esploradon en simila maniero.

# Novjaraj pentraĵoj




Trajno Venis al Montvilaĝo  de HE ĈENG



Studo de Teorio — de **VANG BIAŬ, MAŬ VENZUO** kaj **ĜOŬ ĴUJVEN**

Bonkvalitan Ŝtalon al la Partio — de laboristoj **DENG KAJPI** kaj **LIN ĴANGVANG**







Sur Vojo al la Lernejo de komunumaninoj **DING ŜIKIAN** kaj **JIN HIAŬKIN**

Arta Pluvo de **VU GIĴEN**






Kora Instruado





de HUANG NAJJUAN, VANG LAJHIN kaj FANG E-KIN

# Pentraĵoj de infanoj




Lerni Agrikulturon de **LA BELARTA GRUPO DE HINĜONGGIE-MEZLERNEJO DE PEKINO**

Oletuboj de Daking Atingis Nian Urbon de **LI VEJVEJ** (knabino 11-jara)







Antaŭ Tian-anmen-pordego de **LI DONGJE** (knabino 11-jara)

Mi Kreskas Kune kun la Arbidoj de **LI HONGGUANG** (12-jara)






Je Fajfado de **LIU ĈANGĴUN** (12-jara)




Daĝaj Estas Bona de **ĜOŬ JING** (knabino 7-jara)



Riĉa Rikolto de Mandarinoj de **HJU HIANGBEJ** (12-jara)

Ruĝaj Gvardianetoj en Vintro

de **JANG PING** (knabino 14-jara), **JAN ŜUHIA** (knabino 16-jara), **LI HIAŬHUA** (knabino 14-jara) kaj **VANG KINGĜEN** (knabino 15-jara)



# Ekfruktis sterilaj pomarboj

de **BAJ ŜAN**



*Jang Ĝenbaŭ en stucado al fruktarboj*

EN Ĉaŭjang-regiono cirkulas rakonto pri kuracado de "sterilaj" pomarboj fare de Jang Ĝenbaŭ, studento de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto.

En la brigado Tangfang de Dasangiazi-komunumo de Bejpiaŭ-gubernio je pli ol kvindek kilometroj fore de la nomita instituto troviĝas pli ol 400 fruktarboj, el kiuj estas 103 "Guoguang"-pomarboj kun la aĝo de 16-17 jaroj. Antaŭ la jaro 1973, tiuj pomarboj nur floris sed ne fruktis. Iun jaron la vetero estis tre favora por plantaĵoj. Vidante la pompe florantajn fruktarbojn, oni diris esperplene: "Ĉifoje ili fruktos!" Sed baldaŭ la floroj falis kaj en aŭtuno ĉiu arbo donis meznombre malpli ol dek pomojn. De tiam oni opiniis, ke la pomarboj povas nur flori sed ne fruktodoni!

En la jaro 1973, ekfruktis tiuj "sterilaj" pomarboj kaj 47 el ili donis pli ol 1,670 kg. da pomoj. En la jaro 1974, oni rikoltis pli ol 5,250 kg. da pomoj sur la 103 arboj. Tio estis vere riĉa rikolto.

Pro kio do tiel okazis?

La nomita komunumo lokiĝas en regiono de montetoj nordoriente de Ĉaŭjang, kie ofte okazas ventego kaj sekeco, kaj malfekunda estas la tero. En la komunumo estas multaj fruktarboj, sed ili donis malmulte da fruktoj. Pro manko de agrikultura teknikisto kaj sperto en mastrumado la stato de malalta produkto longe ne povis ŝanĝiĝi.

En la jaro 1972, la nomita instituto varbis studentojn en la loko. La partia komitato de la

komunumo kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj rekomendis 20-jaran junulon Jang Ĝenbaŭ al la fruktarba fako de la instituto por lerni.

Jang Ĝenbaŭ estas junulo kiu plenkreskiĝis sub la ruĝa flago. Kun profunda amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Partio li studis tre serioze kaj diligente precipe pri kulturado de fruktarboj, prevento kaj kuraco de iliaj malsanoj kaj ekstermo de fiinsektoj. Pensante pri la "sterilaj" fruktarboj de la brigado kaj la malalta produktokvanto de la fruktarboj de la komunumo li tiel maltrankviliĝis, ke li eĉ perdis apetiton.

Ekde printempo de 1973, li plurfoje reiris al sia produkta taĉmento por labori kun kamparanoj laŭ la instrua principo de kombino de klasĉambra lernado kun produkta praktiko. En produkta laboro li atente observis la fruktarbojn. Iun tagon li rimarkis, ke bruna muko fluis el torusrando de pomarba floro, gustumis ĝin kaj trovis ĝin dolĉa. Post kelkaj tagoj, la floroj falis. Kial? Li atente observadis kaj trovis, ke stelraŭpo penetris en la burĝonon kaj detruis la fl ororganon, tiel ke muko elfluis. La fiinsekto kiu detruis florojn estis malkovrita. Jang Ĝenbaŭ tuj raportis tion al la gvidantoj kaj oni ekagis por ekstermi la fiinsektojn. Sed, ĉu ili estas la kaŭzo de la sterileco de la arboj? Li ankoraŭ ne estis certa pri tio. Por pluapaŝe observi kaj studi la leĝon de florado kaj fruktado de pomarbo, li daŭrigis sian laboron apogante sin sur kolektiva forto. Post esplorado la agronomia grupo gvidata de li trovis ke tieaj "Guoguang"-pomarboj floras je unu semajno pli malfrue ol aliaj specioj kaŭze de tieaj grundo kaj klimato, kaj florpleniĝas ne samtempe. Oni konstatis, ke nur 12.9% de la floroj estas ĝustatempaj, 48% de ili estas duaperiodaj kaj la ceteraj estas triaperiodaj. Pomarbo estas krucpolenada arbo. Kiam la duaperiodaj floroj prosperas, maloftaj estas la ŝancoj de polenado. Tio estas la baza kaŭzo, ke la floroj ne donis fruktojn. Tiu malkovro de la agronomia grupo de Jang Ĝenbaŭ atentigis pri polenado de la duaperiodaj floroj. Ankaŭ la instruistoj kaj studentoj de la instituto studis kune kun ili kaj akiris pruvon pri tio en teorio. Poste la agronomia grupo faris eksperimenton de polenado al la duaperiodaj floroj de 47 "sterilaj" arboj. Aŭtune de tiu jaro, la polenitaj arboj fruktis kaj la totala produktokvanto atingis pli ol 1,670 kg; ĉiu arbo donis meznombre 35 kg., dum la aliaj 56 nepolenitaj malmulte fruktis kiel antaŭe. Tion vidinte la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris ĝoje: "Vere uzebla estas la scio lernita de Ĝenbaŭ en la instituto! Ni kamparanoj ja bezonas tian altan lernejon kaj tiajn studentojn kiel vi!" La vicsekretario de la partia komitato de la komunumo diris: "La Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto estas bona, kaj la studentoj elkulturitaj de ĝi estas vivteneblaj, disponeblaj kaj fidindaj por ni. Ĝenbaŭ, laboru! Multon vi povas fari sur la 3,133 hektaroj da virga tero de la tuta komunumo!"

En printempo de 1975, Jang Ĝenbaŭ diplomitiĝis en la instituto. Kun revolucia entuziasmo li revenis al la hejmloko. Li fariĝis fruktoĝardena teknikisto de la komunumo. Li kaj aliaj junuloj faris jenan planon kun memfido: La nombro de la fruktarboj de la komunumo estos pligrandigita de la nunaj pli ol 57,000 (t.e.malpli ol 4 mezombre por ĉiu homo) al 340,000 en la jaro 1980 (t.e. 20 meznombre por ĉiu homo), kaj Dasangiazi-komunumo ekhavos novan fizionomion: ĝiaj montpintoj plenos de pinoj, la monttalioj plenos de fruktarboj, irigaciaj kanaletoj serpentos ĉirkaŭ la montoj, kaj ĝiaj kampoj produktos abunde grenon kaj kotonon.



BAJ ŜAN:

# Novaj floroj de pikturo


SUR la koloraj bildpaĝoj de tiu ĉi numero ni prezentas al la legantoj kelkajn novajn pentrajojn de Ĉinio. Tiuj verkoj estis montritaj en la Ekspozicio de Ĉinaj Novjaraj Bildoj kaj Pentraĵoj de Geknaboj okazigita en la pasinta jaro.

En la nomita ekspozicio montriĝis 261 novjaraj bildoj kaj 427 pentraĵoj de geknaboj. Tiuj verkoj en strikta ligo kun la batalo inter la du klasoj kaj du linioj kaj la socialisma konstruado de Ĉinio, spegulas la bonegan situacion de profunda disvolvo de la movadoj de studo pri la teorio de diktaturo de la proletaro, de lernado de Daking en industrio, de lernado de Daĝaj en agrikulturo kaj de la revolucioj de eduko, literaturo, arto kaj higiena laboro kaj varme laŭdas la novajn socialismajn aferojn aperintajn en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ilia enhavo estas vasta, iliaj formoj estas diversaj kaj tiuj verkoj en brilaj koloroj plenas je etoso de la epoko.

*Membroj de belarta kurso de amatoroj de komunumo estas en lernado antaŭ kamplaboro.*



Novjara bildo estas popola tradicia pentrarto de Ĉinio. En la malnova socio, la reakcia reganta klaso disvastigis la putran konfucianismon kaj feŭdajn superstiĉojn kaj mondkoncepton de bienuloj kaj burĝaro per malnovaj novjaraj bildoj. Post la Liberiĝo de






*En la geknaba palaco*

Ĉinio, kvankam nombro da bonaj novjaraj bildoj estas kreitaj, tamen pro tio, ke Liu Ŝaŭki kaj liaj sekvantoj uzurpis la gvidantecon de literaturaj kaj artaj branĉoj kaj antaŭenpuŝis reviziisman linion, malnovaj kaj malbonaj novjaraj bildoj propagandantaj pri feŭdismo, kapitalismo kaj reviziismo ankoraŭ inundis ĉie. Dank' al la profunda kritiko kontraŭ la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj en la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la profesiaj kaj amatoraj belartaj laborantoj altigis sian konscion pri klasbatalo, la linia batalo kaj la daŭra revolucio sub la diktaturo de la proletaro. Kun la verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* kiel kompaso, ili persistas en la direkto de servado al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj plenumado de la politiko **"utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligi la fremdlandajn en servo al Ĉinio, lasi cent florojn kune flori kaj forigi la oldajn por elŝovi la novajn"** kaj turnas belartan verkadon en potencan batalilon por firmigi la diktaturon de la proletaro. La komuna karakterizajo de la eksponitaj novjaraj bildoj estas, ke post reformo kaj novigo oni per tiu tradicia arto energie prezentas la novan epokon kaj la novajn personojn kaj entuziasme prikantas la grandan venkon de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.


La pentraĵo *Kora Instruado* prezentas la brilan figuron de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ, kiu klerigas kaj armas popolamasojn per la teorio de Marksismo-Leninismo. La maljunulinoj, knabinoj, infanoj, maljuna eksruĝgvardiano kaj soldatinoj de la Okavoja Armeo atente aŭskultas kun feliĉo brilanta sur la vizaĝoj. Ĝi vivece prezentas la veran senton de la amasoj. La pentraĵo *Sur Vojo al la Lernejo* prikantas la komunisman stilon de amo al la ŝtato kaj la kolektivo montritan de la nova generacio en la kamparo de Ĉinio. Survoje al la lernejo, iu junpioniro vidis, ke maizplantoj de




*Pentristetoj sur doko de Dalian-haveno*

la komunumo falis, ŝi malligis sian harligajn ŝnuretojn kaj atente ilin ligas. La vizaĝo kaj vestoj de la knabino kaj la maiztigoj estas pentritaj per delikataj tuŝoj, tiel ke la figuroj aspektas versimilaj. Oni plene aplikis la apartan teknikon de novjara bildo en pentrado de homoj kaj pejzaĝo kaj atingis relative bonan artan efikon.

En tiu ekspozicio belartaj verkoj de geknaboj estas unuafoje montritaj post la komenco de la



*Amatora kamparano-pentristo Lin Ŝoŭjan*



*Belarta kurso de geknaboj*

Granda Proleta Kultura Revolucio. Inter ili estas ĉinstilaj, guaŝaj, oleaj kaj paŝtelaj pentraĵoj, papertondaĵoj kaj bildoj el ŝtofpecetoj. El la malgrandaj verkintoj la plej juna aĝas je 4 jaroj kaj la plej aĝa havas 17 jarojn. Iliaj forta sentimento, riĉa imago, hiperbolaj esprimoj, drastaj koloroj kaj naiva piktura lingvo formis apartan stilon de la geknaboj.

Inter la eksponitaĵoj sin trovis pentraĵo titolita per *Rakontado de Maljuna Malriĉkamparano pri la Historio de Lia Familio,* kiu montras grupon de tibetaj elementlernejanoj aŭskultantaj rakontadon de maljuna malriĉkamparano pri liaj suferoj en la malnova socio kaj feliĉo post la Liberiĝo. Tiu verko emfazas la penson, ke klasbatalo estas la ĉefa studobjekto por la junuloj. La pentraĵo *Oletuboj de Daking Atingis Nian Urbon* spegulas novan sukceson de la ĉina petrola industrio. Ĝia malgranda aŭtoro alprenis suprenrigardan vidpunkton en pentrado de la oletuboj, tiel ke ili venas malsupren el la aero, kaj dank' al tio la konstruaĵo aspektas grandioza kaj la objekto estas elstarigita. Rigardante tiun pentraĵon, oni kvazaŭ aŭdus torentan fluadon de Daking-a oleo en la tuboj. La aŭtoro de *Mi Kreskas Kune kun la Arbidoj* lerte ligas la volon de senĉesa progreso de la geknaboj kun la kreskado de arbidoj, kaj per la originala maniero esprimis la profundan penson. La flirtantaj ruĝaj koltukoj en kontrasto kun la verdaj arbidoj aspektas aparte okulfrapaj, vekante ĉe la rigardantoj la penson, ke la estonteco de la nova Ĉinio estos ankoraŭ pli prospera kiel ruĝaj floroj.

Belarta kreado jam fariĝis ŝatata postleciona aktivado de la geknaboj en Ĉinio. En la urbo Ljuda en nordorienta Ĉinio troviĝas ĉ. 200 belartaj grupoj de geknaboj. Sub la zorgado de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, ili ofte iras al fabrikoj, kamparo kaj armeaj trupoj por bildigi la grandiozajn aferojn de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj pentri la heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, direktate de instruistoj kaj belartaj laborantoj. La ekspoziciitaj verkoj kun certa efekta povo estas kreitaj ĝuste en tia maniero.

LI DONGJE:

# Mia pentraĵo

MIA ekzerca paŝtelo *Antaŭ Tian-anmen-pordego* estas publikigita en gazeto. Tio estas por mi kuraĝigo. Geonkloj demandis, kiel mi ĝin pentris. Pri tio mi volas rakonti de komenco.

Mi estas 11-jara kaj lernas en la kvarjara klaso de la Dongbejlu-a Elementa Lernejo de la urbo Ljuda. En la aĝo de ok jaroj mi komencis lerni pentradon sub helpo de instruisto. Mi ŝatas pentri lernadon kaj vivon de miaj geamiketoj, imitindajn homojn kaj novajn aferojn, kaj precipe Tian-anmen-pordegon. Instruisto diris al ni, ke ĝuste sur la pordego Prezidanto Maŭ solene deklaris, en la unua de oktobro de 1949, la naskiĝon de la Ĉina Popola Respubliko al la tuta mondo. Ekde tiu tago la ĉina popolo ne plu estas subpremata de reakciuloj, tial Tian-anmen fariĝis simbolo de la nova Ĉinio kaj loko aspirata de la tutlanda popolo. Por esprimi mian amon al la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ mi verkis la paŝtelon *Mi Amas Tian-anmen-pordegon de Pekino.*

En la jaro 1972 la itala kontraŭĉinia pajaco M. Antonioni venis al nia lando kaj faris filmon kun titolo "Ĉinio" kalumniantan nian landon. En la filmo la de li fotita grandioza kaj majesta Tian-anmen-pordego estas oblikve staranta kaj super ĝi ŝvebas nigraj nuboj. Kaj por trompi la mondan popolon, ke la ĉinaj infanoj vivas malfeliĉe, li aparte kaptis la planon de ploranta infano timigite de li. Tion aŭdinte, ni tre indigniĝis. Por rebati tiun reakciulon malamikan al la ĉina popolo mi faris la paŝtelon *Ni Venas al Tian-anmen-pordego*, en kiu grupo da infanoj de la nova Ĉinio, kun buntaj floroj en la mano kaj en festaj vestoj, ricevas la revuadon de Prezidanto Maŭ. Ili marŝas en ordaj kolonoj kaj laŭte krias: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Lernu bone kaj progresu kun ĉiu tago!"

En la pasinta jaro mi informiĝis, ke okazos Tutlanda Ekspozicio de Pentraĵoj de Geknaboj en la ĉefurbo Pekino. Kion mi dediĉos al ĝi? Mi pensis, ke ni ankoraŭ ne finis la kritikon al Antonioni, kaj mi devas partopreni en la batalo per pli bona pentraĵo. Mi ekmemoris, ke mia patro vojaĝis al Pekino pro laboro kaj fotiĝis antaŭ Tian-anmen-pordego. Tio estas por mi granda edifo. Jes, Pekino estas loko loĝata de Prezidanto Maŭ, oni rigardas viziton al Tian-anmen kiel venon al Prezidanto Maŭ, tial ĉiu deziras tie sin fotigi. Ankaŭ la patrino kaj instruistoj fotiĝis antaŭ Tian-anmen-pordego, kiam ili estis en Pekino. Ĉiuj popolanoj kaj geknaboj de niaj diversaj naciecoj havas tiun deziron. Tiel aperis en mia kapo la temo de la pentraĵo *Antaŭ Tian-anmen-pordego.*

En la unua pentraĵo mi pentris diversnaciecajn geknabojn en kantado kaj dancado dum ilia fotiĝo antaŭ Tian-anmen. Vidinte ĝin, instruistoj kaj kunlernantoj montris, ke la personoj estas en malordo, kaj iliaj vestoj kaj figuroj ne havas originalecon. Poste mi petis konsilojn de geonkloj, kiuj bone konas nacimalplimultojn, kaj referencis multajn bildlibrojn por koni originalajn vestojn kaj figurojn de diversnaciecaj geknaboj.

Post revizio mia paŝtelo montras, ke geknaboj de diversaj naciecoj respektive en sia nacia vesto staras en vicoj por fotiĝo. Mi lokis en la mezon de la paŝtelo gaŭŝan-naciecan knabon de la ankoraŭ neliberigita Tajvan-provinco, por ke alinaciecaj geknaboj de la patrolando staru kune kun li manon en mano. Pan Dongzi en la infanrakonta filmo *Trembrilanta Ruĝa Stelo* estas nia heroo kaj lerninda ekzemplo. Ankaŭ lin mi pentris en mia verkaĵo.

Tiu ĉi pentraĵo estis elektita al la Tutlanda Ekspozicio de Pentraĵoj de Geknaboj en 1975. 72 pentraĵoj de la geknaboj de Ljuda montriĝis en la ekspozicio, kaj nia lernejo havis 14 tie, el kiuj 4 pecoj eĉ eksponiĝis poste en amikaj landoj.

La aktivado de amatora belarta verkado bone disvolviĝas en nia lernejo. Ĉiuj ŝatas pentri, kaj de la jaro 1974 ĝis nun ni pentris pli ol 50,000 pecojn kaj okazigis 5 ekspoziciojn de pentraĵoj.

Ĉiufoje, kiam mi finis pentradon kaj faris viziton al ekspozicio, mi pensis: Kial ni povis fari tiom multe da pentraĵoj? La kaŭzo kuŝas en tio, ke nia lernejo plenumas la proletan edukan linion de Prezidanto Maŭ. Instruistoj ne nur donas lecionojn en la klasĉambro, sed ankaŭ gvidas nin al fabrikoj, havenoj kaj popolkomunumoj por tie peti laboristojn kaj kamparanojn doni al ni sciojn pri klasbatalo kaj produkto. El ilia rakontado ni sciis, kiel la laboristoj laboras kaj kiel la kamparanoj terkulturas, kiel la bienuloj kaj kapitalistoj ekspluatis la malriĉulojn en la malnova socio kaj kiom feliĉe vivas la laboranta popolo en la nova socio. Iufoje, dum nia fiziklaborado avo malriĉkamparano rakontis al ni: "En la malnova socio la infanoj de ni laboruloj eĉ ne povis sin satigi por ne paroli pri pentrado! Kiom feliĉe vi vivas hodiaŭ sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj tion vi devas amegi!" Iutempe ankaŭ ni partoprenis en fiziklaboro por koni la vivon kaj havigi al ni sciojn kaj samtempe trovi en tio temojn por pentrado. Miaj kunlernantoj diris: Ni nepre devas ĉiam observi la vortojn de Prezidanto Maŭ **"lernu bone kaj progresu kun ĉiu tago"**, diligente studi por bone servi al la popolo kaj pentri plimulte da belaj pentraĵoj.

*La aŭtoro de la artikolo Li Dongje (meze) en kreado de nova verko*



FU VEN:

# "Nudpieda" Kuracisto Liu Han



*Liu Han*

EN la vasta kamparo de Ĉinio aktivadas pli ol 1,300,000 kuracistoj. Ili ofte partoprenas nudpiede en agrikultura kolektiva produktado kaj ricevas sian porcion en la kolektiva distribuado de laborfruktoj same kiel la komunumanoj, kaj la amasoj intime nomas ilin "nudpiedaj" kuracistoj. En la lastaj jaroj ili multe kontribuis al ŝanĝo de la stato de la kamparo, al kiu mankis kuracistoj kaj medikamentoj. Ĉi sube mi prezentu al vi la "nudpiedan" kuraciston Liu Han de Ŝenging-brigado, Fuju-gubernio, Gilin-provinco en la nordoriento de Ĉinio.

37-jara Liu Han okupis sin pri medicina laboro jam 20 jarojn. La amasoj nomas lin "kamparano-kuracisto". Kiel stariĝis la intima rilato inter Liu Han kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj? Kiel li komencis lerni medicinon kaj doni kuracan helpon al la komunumanoj?

Por tion respondi mi rakontu al vi lian neordinaran travivajon: Antaŭ la Liberiĝo en la hejmloko de Liu Han, same kiel en aliaj lokoj de la ĉina kamparo, la malriĉaj kamparanoj estis ne nur subpremataj kaj ekspluatataj de bienuloj, sed ankaŭ turmentataj de malsanoj kaj multaj el ili mortis pro manko de kuraco. Kiam Liu Han estis ankoraŭ infano, lia patrino trafis puerperan febron. Lia patro malfacile venigis kuraciston, kiu, anstataŭ ekzameni la pacientinon, unue trinkis kaj ĝue manĝegis. Por skribi recepton li postulis honorarion de du dekalitroj da rizo. Kiam la patro alportis la medikamenton aĉetitan per prunteprenitaj rizo kaj mono, la patrino jam ĉesis spiri. Rigardante la kvar skeletajn genepojn la pli-ol-70-jara avino tuttage ploris kaj pro tio blindiĝis kaj lia plej juna frateto mortis de malsato. La sama travivaĵo de la familio de Liu Han kaj la vastaj laborantaj amasoj multe edukis lin kaj li jam de sia knabeco faris decidon lerni medicinon por forigi suferojn de la amasoj.

En 1945 la hejmloko de Liu Han liberiĝis, la laboranta popolo fariĝis mastro de la ŝtato kaj



*Dum laborpaŭzo*

Liu Han ekvizitis lernejon. Tamen pro influo de la reviziisma higiena linio de Liu Ŝaŭki, al la vasta kamparo ankoraŭ mankis kuracistoj kaj medikamentoj kaj la amasoj ne povis ricevi ĝustatempan kuracadon.

Kiam Liu Han lernis en elementa lernejo, okazis epidemio en la vilaĝo. Pro manko de kuracistoj en proksimeco kaj nesufiĉo de medikamento la malsanuloj suferis pli pezan doloron. Vidinte tion Liu Han brule maltrankviliĝis. Li pensis, ke kiel bone estus, se li scipovus kuracarton. En 1954 li diplomitiĝis el la elementa lernejo kaj restis en la vilaĝo por partopreni en fizika laboro kaj lerni la ĉinan medicinon. La partia filio de la vilaĝo tre zorgis lin kaj donacis al li la verkojn de Prezidanto Maŭ Zedong *Servu al la Popolo* kaj *Memore al Norman Bethune,* por ke li lernu de la komunismaj batalantoj Ĝang Side kaj Norman Bethune kaj estu homo utila al la popolo.

La zorgo de la partia organizo plifirmigis lian decidon lerni medicinon por la popolo. Li lernis de veteranaj ĉinmedicinaj kuracistoj kaj samtempe kolektis popolajn receptojn kaj kuracajn metodojn kaj kuracis amasojn per akupunkturo kaj drogherboj.

Tio multe ĝojigis la amasojn, tamen la gubernia higiena sekcio praktikinta la reviziisman higienan linion ne aprobis tion. Ĝi eĉ sendis homojn al Ŝenging-brigado por traserĉi la medikamentan keston de Liu Han kaj deklaris, ke li ne rajtas preskribi.

La Granda Proleta Kultura Revolucio frakasis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki. Sub la direktado de la instrukcio de Prezidanto Maŭ **"meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon"** la novaj socialismaj aferoj kiaj koopera kuracado kaj "nudpieda" kuracisto aperis en la ĉina kamparo kvazaŭ fungoj post pluvo. En 1969 fondiĝis stacio de koopera kuracado en Ŝenging-brigado kaj Liu Han estis asignita kiel ĝia "nudpieda" kuracisto.

La konfido de la komunumanoj multe kuraĝigis Liu Han kaj li decidis preni N. Bethune kiel ekzemplon kaj senegoisme plenumi la laboron de "nudpieda" kuracisto. Kune kun la amasoj li kritikis la reviziisman higienan linion kaj rezo-

lute faris rompon kun diversaj burĝaj flegmaj sintenoj al la suferoj de la amasoj en kuracado.

La komunumanoj de Ŝenging-brigado loĝas dise. Liu Han do malgraŭ laciĝo vizitas ilin kun medikamenta kesto por doni medicinan helpon kaj entuziasme propagandi al ili higienan scion, ĉu en varmega somero aŭ en frosta vintro, ĉu en furioza ŝtormo aŭ en torenta pluvo.

Laŭ la principo "preni preventadon kiel ĉefan laboron" Liu Han kaj aliaj "nudpiedaj" kuracistoj de la kuraca stacio atente faras ĝustatempe preventajn injektadojn kaj liveras preventajn medikamentojn. Printempe ili disdonas morbilopreventajn dekoktaĵojn al la infanoj kaj miksas kontraŭgripajn drogherbojn en akvujojn de la komunumanoj; somere ili konsilas al komunumanoj multe manĝi legomojn kiuj povas preventi enteriton kaj mobilizas ilin por disvolvi patriotan higienan movadon. Dank' al ilia klopodo multaj malsanoj precipe epidemioj malmultiĝis jaron post jaro kaj senĉese boniĝis la sanstato de la amasoj, per kio ili efike subtenis la agrikulturan produktadon.

Liu Han kaj aliaj kuracistoj de la kuraca stacio diligente klopodas por ŝanĝi la postiĝintan higienan fizionomion de la brigado. Ili preventas kaj kuracas ripetemajn kaj ordinarajn malsanojn per la ĉina kaj okcidenta medicinoj kaj sukcesis en kuracado de iuj malfacilaj kazoj. En Ŝenging-brigado vaste cirkulis rakonto pri la kuracado de Liu Han al stomaka malsano.

Maljuna malriĉkamparano Vu Hiangtaj suferis de serioza stomaka malsano pro penlaborado ĉe bienulo kiel jardungito en la malnova socio. Foje la malnova malsano denove atakis lin. Informiĝinte pri tio Liu Han tuj rapidis al li. Li unuflanke konsolis lin kaj alifanke faris al li zorgeman kuracadon. Antaŭe li neniam kuracis tian malsanon. Laŭ priskribo de medicina verko li aldonis venenan drogon al recepto por kuraci tiun malsanon. Tamen la efiko ne estis kontentiga. Ĉu la dozo ne sufiĉis? Li decidis mem trinki tian dekoktaĵon por provo. Kiam li sesobligis la maksimuman kvanton de tiu drogo difinitan de la libro kaj trinkis ĝin,



*Preparado de medikamentoj el drogherboj kulturitaj de Liu Han kaj liaj kolegoj*

aperis ĉe li simptomo de toksiĝo. La aliaj kamaradoj de la stacio tuj preparis por li sentoksigilon kaj admonis lin preni. Ekondiĝis en li pensoj. Li pensis, ke komunistoj devas esti ĉiam pretaj oferi sian vivon por la komunisma afero. Se oni mortas pro savo de vivo de klasa frato, tia morto ja estas inda. Kuŝante sur la lito li aplombe kaj atenteme perceptis la efikon de la drogo. Post du horoj la toksiĝeco malaperis. Dank' al tio Liu Han fine sciis kiom da venena drogo estas deca por kuraci la malsanon de onklo Vu. Post kuracado de kelkdek tagoj Vu Hiangtaj povis ellitiĝi. Nun la pli-ol-70-jara onklo Vu ĉiutage kolektas fekaĵojn por la brigado. Ĉiufoje kiam oni demandis lin, per kia medikamento Liu Han resanigis lin, li ĉiam kun emocio respondis: "Liu Han savis min per sia propra vivo!"

En la lastaj jaroj li klopodis por koni la karakterizaĵojn, uzmanieron kaj konvenan dozon de diversaj drogherboj. Rilate al tiuj drogoj, kiuj devas esti provitaj en praktiko, li persone ilin gustumis. Krome li ankaŭ provis akupunkturon kaj sangoĉesigan medikamenton sur sia korpo. Dank' al tio li grandigis la maksimumajn dozojn de iuj drogoj, vastigis ilian uzeblecon kaj sukcesis en kuracado de iuj malfacilaj kazoj.

Por havigi drogherbojn al la stacio Liu Han kun aliaj "nudpiedaj" kuracistoj de la stacio kulturas drogherbojn ĉirkaŭ la domo de la stacio en frumateno kaj vespero. Ili ankaŭ sukcesis enkonduki specojn de drogherboj netroveblaj en la loko. Nun la medikamenta farejo funkciigata de ili mem jam povas prilabori pli ol 100 specojn de medikamentoj, kiuj konsistigas pli ol 70% de la medikamentoj bezonataj de la brigado, tiel ke komunumanoj suferantaj ordinarajn malsanojn ne bezonas iri aliloken por medicina helpo. Pro tio la kuraca stacio de Ŝenging-brigado estas varme akceptata de la amasoj kaj elektita kiel avangarda unuo de la gubernio, subprovinco kaj provinco.

Ĉar Liu Han faris kontribuon al medicina afero de la kamparo, li estis promociita kiel vicestro de la higienaj burooj de la gubernio kaj subprovinco.

Kiel kondutas Liu Han je ricevo de multaj honoroj kaj pli alta rango? Iuj konsilis lin labori kiel kuracisto en granda hospitalo. Tamen li rigardis la honorojn kaj pli altan rangon kiel stimulon al li por daŭrigi la revolucion kaj decidis ne apartiĝi de la komunumanoj, persisti en laboro en la kamparo, neniam ĉasi personan ĝuon kaj ĉiam konservi la naturon de "nudpieda" kuracisto. Liaj faroj estas multe laŭdataj de la amasoj en la subprovinco.

En 1970 la partia organizo decidis sendi Liu Han al medicina instituto por studi. La zorgo de la Partio tre kortuŝis lin. Tamen li pensis, ke la sistemo de koopera kuracado fondiĝis antaŭ nelonge kaj oni devas daŭre plifirmigi kaj disvolvi ĝin, ke por ĝisfunde ŝanĝi la staton de la kamparo al kiu mankas kuracistoj kaj medikamentoj ankoraŭ multaj laboroj estas farendaj kaj li ne devas forlasi la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn. Li do senhezite petis permeson resti en la kamparo.

Post kiam li fariĝis vicdirektoro de la higiena buroo, multan tempon li devas uzi por kunveno kaj laboro en la buroo. Sed apenaŭ finiĝis kunveno kaj laboro en la buroo, li tuj revenis al la brigado por partopreni en agrikultura produktado kaj doni medicinan servon al la kamparanoj. Kiam komunumanoj ripozas dum laborpaŭzo, li kuracas malsanulojn. Rilate al malnovaj malsanuloj, li vizitas ilin en la difinita tempo aŭ post la laboro. Iafoje li donis urĝan helpon al malsanuloj en nokto, tamen en la sekvanta tago li same kiel aliaj iris al kamplaboro. Li komprenis, ke nur se oni ne apartiĝas de laboro oni povas interligiĝi kun la amasoj koro ĉe koro.

Foje maljuna malriĉkamparano de la najbara provinco venis al Liu Han por peti medicinan helpon. Survoje li jam renkontiĝis kun Liu Han, tamen li neniam pensis, ke li en blanka kamparana ĉemizo, kun pajla ĉapelo sur la kapo, kaj ŝpato sur la ŝultro, estas kuracisto. Kiam Liu Han revenis de sarkado kaj ekzamenis la malsanon de la maljunulo, tiu ĉi diris emocie: "Pli taŭgas unu vido ol dek aŭdoj. Vi vere estas kamparana kuracisto tute simila al ni komunumanoj!"




# Neforgesebla vizito al Meksikio

de la Esplora Grupo de Maizo
kaj Sorgo de la Ĉina
Akademio de Sciencoj

JAM de longe ekzistis la amika kontaktiĝo inter Ĉinio kaj Meksikio, precipe depost la jaro 1972, kiam ambaŭ landoj starigis inter si diplomatiajn rilatojn, multe oftiĝis amikaj intervizitoj de ambaŭ popoloj.

En la fino de la pasinta jaro ni faris en Meksikio sciencan esploradon kaj amikan viziton kaj ricevis varman bonvenigon kaj amikan akcepton de la registaro kaj la popolo de Meksikio. Nelonge post kiam ni atingis Meksikon, nin akceptis la agrikultura kaj brutobreda ministro de Meksikio D-ro Brauer. Li ĝoje rememoris la amikan viziton de la ĉina vicĉefministro Ĉen Jongguj al Meksikio en la jaro 1975, kaj sian viziton al Ĉinio en 1974. Kaj cetere li donacis al ni sian verkon "Aplikata Fitogenetiko" kun lia subskribo. En Guadalajara de Jalisco la ŝtatestro akceptis nin en sia hejmo kaj demandis multe pri la disvolviĝo de la agrikulturo de Ĉinio.

La vasta popolo de Meksikio esprimis al ni sian bondeziron pri disvolviĝo de amika kontaktiĝo inter Ĉinio kaj Meksikio. En la vilaĝo Malgranda San Martin de Puebla, kamparanoj regalis nin per memfarita agava trinkaĵo. Montrante la ondantan montaron, ili kortuŝe diris: "Ni rigardis vian filmon pri lernado de Daĝaj en agrikulturo kaj la novan fizionomion de la disvolviĝo de agrikulturo post batalo kontraŭ la naturo. De tio ni estas tre inspirataj." En parkoj aŭ restoracioj, naivaj infanoj kun paperoj en la manoj petis nin subskribi kaj instrui al ili prononcon de la vorto "Ĉinio" en la ĉina lingvo. Sur strato aŭ en hotelo, nin salutis nekonataj meksikianoj. Multaj meksikiaj



*Vizito al la Agronomia Aŭtonoma Instituto Antonio Narro de Meksikio*

amikoj zorgeme konservis la donaĉajon donitan de iliaj ĉinaj amikoj kiel memoraĵon por la amikeco inter Ĉinio kaj Meksikio.

En la vizito, ni intervidiĝis kun multaj malnovaj amikoj konatiĝintaj en la scienca kaj teknika interŝanĝo de agrikulturo inter Ĉinio kaj Meksikio, kaj amikiĝis kun nemalmultaj meksikianoj. Doktoro Jimenez, direktoro de Chapingo-instituto, amikiĝis kun ni en sia vizito al nia lando je novembro de 1975. Post kiam li revenis al sia lando, li faris raporton en Puebla-ŝtato pri lernado de Daĝaj en Ĉinio. Ĉifoje, ni ĉiuj estis tre ĝojaj pro la refoja intervidiĝo en Meksikio. Kiam ni vizitis la instituton, Doktoro Jimenez ĉiamaniere klopodis por plenumi niajn postulojn en nia esploro, kaj invitis nin partopreni en ilia nacistila pikniko okazigita ĉiujare por adiaŭi la diplomitojn kaj bonvenigi la novajn lernantojn. Doktoro Jimenez esprimis, ke li plue klopodos por disvolvi la amikecon kaj sciencan kaj teknikan kunlaboron inter Meksikio kaj Ĉinio.

D-ro Castro de la Agronomia Aŭtonoma Instituto Antonio Narro, la fame konata sukcesinto en kulturado de malaltega maizo, vizitis Ĉinion en aŭgusto de 1975. En la tago, en kiu ni finis nian viziton en la urbo Monterrey kaj veturos al Saltillo, frumatene D-ro Castro veturis al ni kune kun aliaj meksikiaj amikoj, kiuj iam vizitis nian landon kune kun li. Ili detale prezentis sian sperton en bredado de maizo. En la jaro 1975, D-ro Castro intervidiĝis dufoje kun la ĉina vicĉefministro Ĉen Jongguj en Meksikio kaj Pekino kaj vizitis Daĝaj. Li diris: "Mi vizitis Daĝaj. Ĝi estas konstruita de la laboruloj per ŝultroj kaj manoj sub la gvido de via vicĉefministro Ĉen Jongguj kaj enkorpigis Maŭzedong-penson. Daĝaj estas modelo ne nur de la ĉina agrikulturo, sed ankaŭ tiu inspiranta la disvolviĝantajn landojn kiel la nian al peniga laborado."

*Rigardado de maizplantoj kun malaltega tigo en la Nordokcidenta Agronomia Esplora Centro de Meksikio*



Post la sendependiĝo, precipe en la lastaj jaroj, sub la gvido de Prezidanto Echerveria, Meksikio ĉiam metas en gravan pozicion la disvolvon de grenproduktado kaj genetika bredado de agrikulturaj plantoj. En tiu laboro Meksikio tre atentis adaptiĝon de scienca esplorado al produkto, kio ludis bonan rolon en disvolvo de grena produktado kaj en altigado de produktokvantoj de aliaj agrikulturaj plantoj. Meksikio kulturas hibridigitan sorgon, kaj antaŭe ĉiujare devis importi la semon. En la lastaj jaroj, por radikale liberigi sin el kroĉiĝo al fremdlandoj, Meksikio mem bredis hibridajn sorgojn per koncentrita forto. Tiaj sorgoj estas bonvenaj al meksikiaj kamparanoj kaj vaste aplikataj pro tio, ke ili donas pli da grajnoj kaj estas pli eltenemaj de atako de malsanoj kaj fiinsektoj ol tiuj de la importitaj. Meksikiaj amikoj fiere diris al ni: "Post kelkaj jaroj, kiam vi refoje vizitos Meksikion, vi ne plu povos vidi importitajn hibridajn sorgojn." La meksikiaj sorgo kaj maizo estas karakterizitaj ĉefe de alta produktokvanto, mallonga tigo, frua maturiĝo, bonkvalita grajno, eltenemo de sekeco, malvarmo, malsanoj ktp, estas multe similaj al novaj specioj de sorgo de nia lando. Dank' al fervora helpo de meksikiaj kolegoj ni lernis multan bonan sperton.

La esplora laborado jam finiĝis. Kvankam nia vizito al Meksikio estis mallonga, tamen ĝi restas neforgesebla.




ZONG MIN:

# La Tuĝjaoj

En la okcidentaj partoj de la provincoj Hubej kaj Hunan deantikve loĝas la diligenta kaj kuraĝa nacieco Tuĝja, kiu havas tradicion de revolucia batalo.

Tiu nacieco havas ĉirkaŭ 600,000 membrojn, el kiuj 380,000 dense loĝas en la Tuĝja-a kaj Mjaŭ-a Aŭtonoma Subpovinco en Okcidenta Hunan, kaj la ceteraj loĝas en la subprovinco Enŝi de Hubej-provinco. La regionoj loĝataj de tuĝjaoj estas abundaj je arbaroj kaj riveroj, kiuj pretigas favorajn kondiĉojn por la disvolvo de agrikulturo, lignoindustrio, brutobredado, neagrikulturaj okupoj kaj fiŝbredado. La tuĝjaoj prenas agrikulturon kiel sian ĉefan okupon kaj kulturas rizon, maizon, tritikon, bataton, beton, kotonon, aleŭriton, olean kamelion, teon k. a.

La Tuĝja-a nacieco havas longan historion. Laŭ historia literaturo, en la komenco de la 10-a jarcento la tuĝjaoj jam komencis agrikulturan produktadon kaj emis fiŝadi kaj ĉasadi. Viroj kaj virinoj same laboris en agrikultura produktado per primitiva metodo. Ili kulturis diversajn grenajn plantojn sen sterkado kaj irigacio kaj migris alien por ekspluati novan teron, post kiam la kampoj tute steriliĝis. En Song-dinastio (de 960-a ĝis 1279-a p. K.) la tuĝja-aj terkulturistoj komencis uzi plugilon kaj bovon kaj irigacii per norio. En Ming-dinastio (de 1368-a ĝis 1644-a p. K.) kaj King-dinastio (de 1644-a ĝis 1911-a p. K.) la centraj feŭdaj regantaroj plifortigis sian regadon super la tuĝjaoj, kaj la agroj rapide koncentriĝis, tiel ke la bienulaj ekonomio kaj agrikulturo plue disvolviĝis. Antaŭ la Liberiĝo en 1949 la regionoj de tuĝjaoj fariĝis, same kiel la tuta lando, duonfeŭda duonkolonio kaj la popolo subpremata de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo vivis en abismo de suferoj.

Pro la longtempa kontaktiĝo kun han-nacieco, la ideologio, kulturo, moroj kaj kutimoj de la tuĝjaoj estas preskaŭ samaj al tiuj de han-nacieco. Plejparto de la tuĝjaoj scipovas paroli kaj legi en la hana lingvo kaj parto de la tuĝjaoj scipovas ankaŭ la mjaŭ-an lingvon krom la hana. En la feŭda periodo la tuĝja-aj superuloj kaj la centraj feŭdaj regantaj klasoj koluziis en kompIoto kaj plejparto el ili oponis kontraŭ la sociaj reformoj. Tamen la laborantaj tuĝjaoj amike kunvivis kun hanoj en solidareco, faris interŝanĝojn en ekonomio, kulturo kaj produktaj teknikoj.

En la obskura malnova socio la tuĝja-aj popolanoj plurfoje partoprenis en kamparanaj insurekcioj por oponi kontraŭ la subpremado de feŭdaj regantoj. En 1861, kiam la kamparanaj insurekciaj trupoj de la Tajping-a Ĉiela Regno gvidata de Hong Hiukjuan trairis la regionojn loĝatajn de tuĝjaoj, ili akiris subtenon kaj helpon de tuĝjaoj en disvolvo de kontraŭfeŭdisma batalo. En la periodo de 1927 ĝis 1935, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la tuĝjaoj ĵetis sin en la batalon kontraŭ la reakcia regado de Ĉiang Kajŝek, fondis ruĝan regpotencon en iuj gubernioj de okcidentaj partoj de la provincoj Hubej kaj Hunan kaj kontribuis al la revolucio. En 1935, kiam la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo trapasis en sia Longa Marŝo la regionojn dense loĝatajn de tuĝjaoj, multaj junaj tuĝjaoj aliĝis al la Ruĝa Armeo kaj iris norden sekvante Prezidanton Maŭ por oponi kontraŭ la japana agreso. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la tuĝja-a popolo faris ardan kontraŭjapanan nacisavan movadon. Ĉiuj tiuj bataloj multe altigis la konscion de la tuĝja-a popolo pri klasbatalo.

Post la Liberiĝo, sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, en la brila lumo de la nacia politiko de la Partio, la tuĝja-a popolo venke faris la batalon por ekstermi banditojn, lukton kontraŭ tiranoj kaj agraran reformon, kaj poste efektivigis nacian regionan aŭtonomecon.

Revolucio ja celas liberigon de produktaj fortoj. Forte puŝate de la socialisma revolucio, la diversaj flankoj de la socialisma konstruado en la regionoj de tuĝja-nacieco atingis grandajn sukcesojn kaj la tutaj regionoj aspektas aliforme kun ŝanĝiĝo egala al tiu en pluraj jarcentoj.

Antaŭ la Liberiĝo, pro la kateno de la feŭda terposeda sistemo, la agrikulturo de la tuĝjaoj longe res-

tis en stagneco kaj postiĝinteco kaj la grena produktokvanto estis tre malgranda. La Agrara Reformo abolis la feŭdan terposedan sistemon kaj senprecedence altigis la aktivecon de la kamparanoj en produktado. En 1952 ili akiris la unuan abundan rikolton de agrikulturo. Poste, dank' al la kooperado kaj starigo de popola komunumo la grena produktado de la regionoj de tuĝjaoj rapide leviĝas jaron post jaro. Ni prenu la popolan komunumon Luota de Longŝan-gubernio de okcidenta Hunan kiel ekzemplon. La komunumo sidas je la absoluta alteco de 1,400 metroj kun malfacila trafikado kaj malabundega akvo. Sed sub la gvido de la Kompartio, apogante sin sur la kolektiva forto de la komunumo kaj luktante en malfaciloj, en kelkaj jaroj ili konstruis akvoutiligajn konstruajojn en pli ol 120 lokoj, fosis kanaletojn sur montoj kun totala longeco de 130 kilometroj, kreis pli ol 300 hektarojn da kampoj sur montodeklivoj. La areo de rizkampoj de la komunumo duobliĝis kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo, la tuta agraro fariĝis akvokampoj kaj 80 pocentoj de la akvokampoj estas irigaciataj de memflua akvo. En la tempo tuj post la Liberiĝo la totala produktokvanto de tiu loko estis nur 1,000 tunoj kun iom pli. Post la fondo de kooperativoj en 1957 tiu superis 1,500 tunojn. Post la starigo de la popolaj komunumoj la produktokvanto de greno kreskas jaron post jaro, precipe dank' al la Granda Proleta Kultura Revolucio ĝi kreskas multe pli rapide kaj meznombre ĉiujare tiu komunumo vendis al la ŝtato 700 tunojn da greno. Cetere ĉiu brigado havas rezervan grenon kaj ĉiu familio superfluan grenon.

Post la Liberiĝo modernaj industrioj fondiĝis kaj disvolviĝis en la regionoj de tuĝjaoj. Ĝis 1972, la Tuĝja-a kaj Mjaŭ-a Aŭtonoma Subprovinco en Okcidenta Hunan kaj la subprovinco Enŝi de Hubej jam starigis la industriojn de metalurgio, maŝinfarado, karbo, elektro, tekstilado, plasto, papero, vino, kemio, konstruado, ŝipfarado k. a. Tuĝjaoj, hanoj kaj mjaŭoj kune konstruis ŝoseojn en la montaro. En 1973 okcidenta Hunan jam havis pli ol 2,700 kilometrojn da ŝoseo. La 10 gubernioj kaj 70% de la komunumoj de la subprovinco estas atingeblaj de aŭto. La Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo konstruita en la kultura revolucio multe proksimigis la regionojn de tuĝjaoj kun la aliaj lokoj de la tuta lando, multe firmigis la solidarecon de la naciecoj kaj akcelis la disvolviĝon de la ekonomio de la regionoj de tuĝjaoj.

Kun la disvolviĝo de la industrio kaj agrikulturo, kaj la pliboniĝo de la popola vivo, impete disvolviĝis ankaŭ la aferoj de kulturo, eduko kaj higieno en la tuĝja-aj regionoj. Antaŭ la Liberiĝo la tuta okcidenta Hunan havis nur 7 mezlernejojn kaj preskaŭ ĉiuj iliaj lernantoj estis gefiloj de bienuloj kaj mandarenoj, la nombro de la element-lernejanoj konsistigis nur 1% de la tuta loĝantaro. La malriĉaj tuĝjaoj preskaŭ ĉiuj estis analfabetoj. Post la Liberiĝo, helpate de la ŝtato, precipe dank' al la kritikado kontraŭ la kontraŭrevoluciaj reviziismaj edukaj linioj de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ en la Granda Proleta Kultura Revolucio, oni sendevie praktikis la proletan edukan linion de Prezidanto Maŭ, fortigis la gvidon de la laborista klaso, malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj al la lernejoj. En la fino de 1973 en la Tuĝja-a kaj Mjaŭ-a Aŭtonoma Subprovinco troviĝis sume pli ol 5,200 mezaj kaj elementaj lernejoj, kaj pli ol 95% de la lernoaĝaj infanoj vizitis lernejon. La nombro de la mezlernejanoj multiĝis je 31% kompare kun tiu en 1965. Plue disvolviĝis la universitato Giŝoŭ fondita en 1958.

En la regionoj de tuĝjaoj, ĉu la gubernioj, ĉu la komunumoj, ĉiuj havas sian hospitalon aŭ sanitarejon. Statistiko en 1973 montris, ke en la aŭtonoma subprovinco estis pli ol 7,000 "nudpiedaj" kuracistoj, inter kiuj 4,300 estis naci-malplimultanoj. Ĉiujare la regionoj de tuĝjaoj disvolvas patriotan higienan movadon. Jam fariĝis kutimo, ke ĉiuj atentas pri higieno kaj pureco, tiel ke la sano de la popolo estas garantiata. Jaron post jaro kreskas la nombro de la tuĝjaoj kaj iliaj regionoj disvolviĝas en prospero.

*Intelektaj gejunuloj de Tuĝja-nacieco*



HISTORIAJ OBJEKTOJ

BAJ LONG:

# Fajencaj homoj kaj ĉevaloj de pli ol 2,000 jaroj

En marto de 1974, kiam membroj de Hijangcun-komunumo situanta oriente de la tombo de Imperiestro la Unua de Kin-dinastio en Lintong-gubernio de Ŝenhi-provinco en nordokcidenta Ĉinio fosis puton, ili malkovris fajencajn homstatuojn kun grandeco de vera homo, je 4 metroj sub la tero.

Konsiderante, ke tiuj statuoj probable havas ian rilaton kun la Imperiestra Maŭzoleo, ili tion raportis al la loka registaro. Poste ili faris esploran fosadon kune kun arkeologoj kaj trovis oriente de la maŭzoleo sendifektan kelon kun longo de 210 metroj, larĝo de 60 metroj kaj totala areo de ĉ. 12,600 kvadrataj metroj. Ili esplore purigis 1,000 kvadratajn metrojn kaj elfosis 520 fajencajn militistojn kun alteco de 1.78-1.87 metroj kaj 24 fajencajn ĉevalojn kun grandeco de vera ĉevalo kaj multajn aliajn valorajn objektojn.

Post forigo de parto de la kovranta tertavolo, aperis mirinda vidajo: en vicoj staras altaj fajencaj militistoj kun pafarko, sagujo, spado, lanco aŭ arbalesto en mano kaj fajencaj ĉevaloj kvarope tirantaj militĉaron. Oni divenas, ke en tiu subtera kelo estas grandioza militira formacio kun tri transversaj vicoj el po 72 homoj en la fronto, kaj 40 kolonoj ĝin sekvantaj kiel la ĉefparto kun aloj kaj ariergardo. Laŭ antaŭkalkulo tie troviĝas ĉirkaŭ 6,000 fajencaj statuoj de militistoj.

Tiel grandaj fajencaj homoj kaj ĉevaloj neniam estis antaŭe elterigitaj en la ĉina historio. La nombro kaj skulptarto de la figuroj superis tiujn de la samspecaj objektoj antaŭe elterigitaj en Ĉinio.

Arkeologiaj laborantoj konstatis, ke la fajencaj homoj kaj ĉevaloj estis enterigitaj kune kun Imperiestro la Unua de Kin-dinastio kiel oferoj antaŭ pli ol 2,000 jaroj.

Imperiestro la Unua de Kin-dinastio (259 — 210 a. K.) estis politikisto de la nove leviĝanta bienula klaso en la antikva Ĉinio. Li oponis kontraŭ la sklava sistemo, efektivigis feŭdan sistemon, fondis la unuan feŭdan centralizisman ŝtaton, nome Kin-dinastion, kaj ludis gravan rolon progreseman en la historio. La eltrovita formacio de bravaj militistoj kaj belaj ĉevaloj en Lintong-gubernio vivece prezentas al ni, kiel Imperiestro la Unua de Kin-dinastio komandis grandiozan militiron por forbalai la restantajn fortojn de la sklavmastroj kaj unuigi Ĉinion.


Dum sia regado, Imperiestro la Unua de Kin-dinastio unuigis la skriban lingvon, leĝojn, mezurajn unuojn, monon, kalendaron kaj ŝpuron. Li fosigis kanalojn, disvolvis kampajn irigaciajn konstruajojn kaj konstruigis ŝoseojn interligantajn ĉiujn partojn de la lando. Li konservis grandan kvanton da antikvaj libroj pri agrikulturo, medicino kaj astronomio.

Imperiestro la Unua de Kin-dinastio bruligis politikajn verkojn de konfucianoj, kiuj laŭdis la antikvan sklavan sistemon kaj insiste proponis ĝin restaŭri. Tio estis kalumniita de postaj konfucianoj kiel "detruo de kulturo".

Laŭ historia literaturo, antaŭ la morto de Imperiestro la Unua de Kin-dinastio, lia tombo jam estis ekkonstruita. Arkeologiaj laborantoj konstatis, ke la fajencaj homoj kaj ĉevaloj en la kelo estis faritaj kiam la imperiestro ankoraŭ vivis. Tiuj belaj fajencajoj montras al ni la nivelon de la skulpta arto en tiu tempo kaj elokvente pruvas, ke la kalumnio de konfucianoj pri "detruo de kulturo" fare de Imperiestro la Unua de Kin-dinastio estas tute senbaza.

Ankaŭ la sepulta sistemo spegulis la ŝanĝiĝojn en la politiko kaj ekonomio de tiu tempo. Je pli ol 100 jaroj antaŭ la unuigo de Ĉinio fare de Imperiestro la Unua de Kin-dinastio, Hiaŭgong de Kin-regno (?-338 a. K.) abolis laŭ la propono de legalizisto Ŝang Jang la sistemon de la sklava socio entombigi vivajn homojn kune kun mortinto. La ĉifoje elterigitaj fajencaj homoj kaj ĉevaloj kaj antaŭe elterigitaj statuoj de palacaj servistinoj montras, ke Imperiestro la Unua de Kin-dinastio heredis la progreseman linion de la legalizistoj en sepulta sistemo, kaj anstataŭ kruele enterigi vivajn homojn kune kun mortinto enterigis fajencajn homstatuojn. Tio havis grandan signifon por akceli la disvolviĝon de la tiama socio.

La fajencaj homoj kaj ĉevaloj montras al ni la eminentajn saĝon kaj skulptan arton de la laboranta



*Arkeologoj riparas elterigitajn fajencajn statuojn de homoj kaj ĉevaloj.*

popolo en Kin-dinastio. La figuroj de militistoj ĉiuj similas al veraj homoj, kun ĝusta proporcio inter la kapo kaj la korpo.

La formado de la kapoj de la statuoj de militistoj elstare markas la altan nivelon de arto de tiuj skulptaĵoj. La pli ol 500 elterigitaj hom-statuoj diferencas unu de alia en aspekto kaj mieno. Iu militisto kun iom kuntiritaj brovoj kaj kunpremiĝantaj lipoj impresas kiel sagaca kaj aplomba mezaĝa oficiro, kiu spertis multajn batalojn; alia kun indigna brilo en la okuloj kaj levitaj brovoj manifestas karakterizaĵojn de brava kaj obstina juna soldato; tria kun suprentorditaj lipharoj kaj serena mieno montras senzorgan optimismon. La hararanĝo de ili estas multspecaj, iliaj kirasvestoj, zonoj, surbandaĝoj kaj botoj estas tiel zorge skulptitaj, ke ili impresas kiel veraj.


Ankaŭ la ĉevalaj statuoj estas tre vivecaj. Kun starigitaj oreloj, antaŭen rigardantaj okuloj kaj kolharoj ambaŭflanke pendantaj ili aspektas viglatentaj. Ankaŭ la proporcio de iliaj korpoj estas konvena.


Laŭ la restaĵo de farbo sur la fajencaj homoj kaj ĉevaloj kaj sur la grundo gluiĝinta al ili oni povas diveni, ke la statuoj estis farbitaj.

La vivplena aspekto de la fajencaj statuoj el Kin-dinastio tute malsimilas al la malvigla kaj mistera etoso de la bronzaj ornamaĵoj de la periodo de Jin kaj Ĝoŭ (de la 16-a ĝis la 8-a jarcento a. K.), tio montras ke la arto jam trapasis la mitan mondon de la periodo de sklava sistemo kaj revenis en la realan socion, prezentante la novan epokon en realismaj manieroj.

Inter la elterigitaj objektoj troviĝas multaj feraj agrikulturaj instrumentoj kaj oraj, jadaj kaj ostaj objektoj, kaj krome ankaŭ tolo, silkaĵo, ledo, ligna ĉaro k.a., kiuj estas utilaj por studi la produktan nivelon de la socio de Kin-dinastio. Ankaŭ granda nombro da valoregaj armiloj kiel bronzaj spadoj, sagopintoj kaj arbalestoj estas elterigitaj kaj iuj el ili estas tre bone konservitaj. Aparte menciinda estas unu spado, kiu ne verdigriĝis kaj ĝiaj klingoj ankoraŭ estas akraj.

Por protekti la valoregajn historiajn objektojn kaj restarigi la militistan formacion de Kin-dinastio antaŭ pli ol 2,000 jaroj, muzeo estas nun konstruata sur la granda kelo. Kaj ĝi montros konkretajn atestaĵojn al la vizitantoj por reĝustigi la historion de Kin-dinastio antaŭ pli ol 2,000 jaroj distorditan de la reakciaj konfucianoj de diversaj dinastioj.





*Armiloj*




# Gianghan-ebenaĵo

de **JANG BO**

KIAM vi atingas Ĝigiang de Hubej-provinco veturante per ŝipo malsupren en la rivero Jangzi tra la tri mallarĝaj kaj torentaj montgorĝoj, antaŭ vi etendiĝas vasta horizonto. Jen estas Gianghan-ebenaĵo. Kaj en la posta vojaĝo vi povas sate rigardi kaj ĝui belan pejzaĝon de la ebenaĵo en la centra Ĉinio.

La ebenaĵo formiĝis de aluvio de la riveroj Jangzi kaj Hanŝuj. Ĝi kun areo de pli ol 40,000 kvadrataj kilometroj situas inter Ĝigiang en okcidento, Vuhan en oriento kaj Ĝonghiang en nordo en la centra kaj suda parto de Hubej-provinco. Ĝi limtuŝiĝas en la sudo kun la Dongting-laga Ebenaĵo de Hunan-provinco.

Se vi navigas per aeroplano super la ebenaĵo, vi vidos sube la riverojn kaj kanalojn interkruciĝantajn kiel araneajon kaj lagojn stele punktitajn. Kaj pro tio la ebenaĵo renomas kiel akvolando. En la antikveco tie estis granda lago. Post multaj ŝanĝiĝoj de la terkrusto en miloj da jaroj, formiĝis tie hodiaŭa vasta fekunda ebenaĵo. Kaj la multaj lagoj ja estas postlasitaj de la antikva granda lago.


Tiu ĉi antikva regiono abundas je historiaj restaĵoj kaj objektoj. En la muzeo de la urbo Ginggoŭ en la mezo de la ebenaĵo eksponiĝas miloj da historiaj objektoj elterigitaj en ĝia ĉirkaŭaĵo. La urbo Ginan, kvin kilometrojn fore de Ginggoŭ, estas la antaŭa sidloko de Jingdu, la ĉefurbo de Ĉu-regno (ĉ. 9-a jarcento a. K. ĝis 223 a. K.) en la ĉina antikveco dum pli ol 400 jaroj. Ĝia urbomuro el ramita tero kun longo de 16 km. ankoraŭ estas bone konservata. Post la Liberiĝo, la popola registaro prenas ĝin por unu el la ĉefaj historiaj lokoj protektataj de la ŝtato. Somere de 1975 ĉinaj arkeologoj fosis apud la urbo Ginan antikvan tombon de pli ol 2,140 jaroj kaj eltombigis nombron da historiaj objektoj kaj bone konservatan viran kadavron, kio ekskuis la arkeologian rondon.

La nomita ebenaĵo naturdotita per modera kaj humida klimato kaj fekunda grundo havas tre favorajn kondiĉojn por disvolvi agrikulturon. La loko taŭgas por kulturi rizon, kotonon, tritikon k. a., kaj en ĝiaj riveroj kaj lagoj oni povas bredi fiŝojn, kulturi lotusojn, akvokaŝtanojn k. a.

Sub regado de la reakciaj klasoj antaŭ la Liberiĝo, la riveroj Jangzi kaj Hanŝuj ofte portis al la ebenaĵo katastrofojn.

La parto de Jangzi-rivero inter Ĝigiang kaj Ĉenglinggi de Hunan-provinco en Gianghan-ebenaĵo no-

*Kamparo de Kiangiang-gubernio sur la ebenaĵo*





*Kamparanoj aktive vendas grenon al la ŝtato.*



*Riĉa rikolto de kotono sur la ebenaĵo*

miĝas Ginggiang-rivero, kies fluejo estis tre zigzaga kaj la riverlito ĉiam pli leviĝis kaj akvonivelo pli-altiĝis ol la ebenaĵo pro precipitaĵo en la pasintaj miloj da jaroj. Dum ŝveliĝa periodo de la rivero ŝipoj kvazaŭ veturus super tegmentoj.

Hanŝuj-rivero estas la plej granda branĉo de Jangzi. Ĝia fluejo estis tre zigzaga kaj ĝia malsupra parto estis malpli larĝa ol la supra, tial la riverakvo fluis ne glate, kaj ĝi ofte inundis kampojn de ambaŭ bordoj kaj endanĝerigis homvivojn.

La sekureco de la ebenaĵo dependis ĉefe de la granda digo, kiun oni nomis "sortodecida digo" en la pasinteco. Ĉiuj reakciaj regantoj en la historio ne zorgis pri firmigo kaj riparado de la digo, tial la inundakvo ofte superfluis aŭ breĉis la digojn kaj kaŭzis katastrofojn. Laŭ la notoj en la historiaj materialoj, la digoj de la riveroj Jangzi kaj Hanŝuj breĉiĝis 440 fojojn en 343 jaroj de 1606 ĝis 1949. La inundakvo en 1931 kaj 1935 dufoje breĉis la digojn, subakvigis 600,000 hektarojn da kampoj kaj senhejmigis 6,000,000 loĝantojn. Krom inunda katastrofo, tiam ankaŭ sekegeco kaj fiinsektoj plagis la popolon.

Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la popolo de tiu regiono kun glora revolucia tradicio de batalo heroe rezistis kontraŭ la agreso de la japanaj imperiistoj, faris rezolutan batalon kontraŭ la kuomintangaj reakciuloj kaj gajnis sian emancipiĝon. Poste, sub la gvido de la Partio, heredante la revolucian tradicion ili suriris la socialisman vojon kaj faris obstinan batalon kontraŭ inundo, sekegeco kaj fiinsektoj, sin apogante sur la kolektivaj fortoj. En 1952, sub la persona zorgo de Prezidanto Maŭ Zedong, la popolo de Hubej-provinco konstruis inundakvo-dividan basenon en Gong-an-gubernio sude de Ginggiang-rivero. Kaj en la norda ekstremo de la baseno oni konstruis grandan inundakvo-lasan kluzon, kiu povas pasigi inundakvon de 8,000 kubmetroj po sekundo. Kiam la ŝvelinta fluo superas la pasigan kapablon de Ginggiang, oni do malfermas la kluzon por sekurigi la digojn. Dank' al la subteno de la tutlanda popolo, la tuta konstruaĵo sukcese stariĝis nur en 75 tagoj. Samtempe kun tio, la popola registaro mobilizis la popolon de la ebenaĵo al konstruado

kaj firmigado de la digoj de Ginggiang kaj per tio altigis ties inundorezistan povon. La inundakvodivida konstruaĵo ludis gravan rolon en rezisto kontraŭ la aparte granda superakvo de 1954. En tiu jaro, aperis en Ginggiang 7 diluvoj, kies akvokvanto estis pli multa je kvar miliardoj da kubmetroj kompare kun tiu de 1935. Tiam oni trifoje malfermis la kluzon por dividi la inundakvon, tio efike sekurigis vivon kaj posedaĵojn de la popolanoj de la ebenaĵo kaj urbon Vuhan. Poste, oni konstruis alian grandan inundodividan konstruaĵon de Dugiataj sur la malsupra parto de Hanŝuj.

Dekomence de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la popolo de la ebenaĵo rektigis la zigzagan riverliton de Ginggiang, tio rapidigis la riverakvan ellason, plie mildigis ĝian minacon al la digoj kaj plibonigis la navigajn kondiĉojn. La Dangiangkoŭ-a Akvoutiliga Pivota Konstruaĵo en la supra parto de Hanŝuj estas starigita en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ĝi ne nur produktas grandan kvanton da elektro, sed ankaŭ efike bridas la superakvon de Hanŝuj. Krome la popolo de la ebenaĵo senĉese faris riparon kaj firmigon al la 4,000-kilometraj digoj de Ginggiang kaj Hanŝuj. Hodiaŭ vicoj post vicoj da arboj ambaŭborde kvazaŭ verda granda muro protektas la digojn kaj la ornamitaj torentaj riveroj Jangzi kaj Hanŝuj aspektas pli junaj kaj pli vivplenaj.

Samtempe kun la inundo-preventado, la popolo de la ebenaĵo ankaŭ faris grandskalan fundamentan konstruadon de kampoj kun akvoutiliga konstruado kiel centro. Ili dragis riverojn, fosis centojn da irigaciaj kanaloj kaj konstruis multajn kluzojn por irigacio kaj drenado kaj elektrajn pumpstaciojn. Tio garantiis riĉan rikolton de dekmiloj da hektaroj da bonaj kampoj ĉu en sekeco aŭ en river-ŝveliĝo kaj pligrandigis areon de agroj.

En la lastaj jaroj, en la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, la popolo de la ebenaĵo faris akvoutiligan konstruadon kaj fundamentan konstruadon de kampoj en ankoraŭ pli granda skalo, la areo de rizo-durikoltaj kampoj grandiĝis jaron post jaro. Dank' al la pliboniĝo de la produktaj kondiĉoj, rapide pliiĝis la produktokvanto de greno, kotono k. a. de la ebenaĵo kaj ĝi jam fariĝis loko vere meritanta la nomon de "lando de fiŝoj kaj rizo". Nun ĝi estas ĉefa grenproduktejo de Hubej-provinco kaj unu el la ĉefaj kotonproduktejoj de nia lando. La produktokvantoj de greno kaj kotono de Ginggoŭ-subprovinco en la mezo de la ebenaĵo respektive triobligis kaj okobligis tiujn de la komenca periodo post la Liberiĝo.

Se vi venas al la ebenaĵo aŭtune, aperas antaŭ vi alloga sceno: maturiĝantaj rizplantoj ore ondiĝas sur kampoj kaj kotonarbetoj plene surportas blankajn fruktojn, grandaj fiŝoj saltas en riveroj kaj lagoj, lotusoj kaj akvokaŝtanoj floras arome . . .

La nomita ebenaĵo antaŭe preskaŭ havis nenian industrion kaj la transportado dependis ĉefe de akva trafiko. Nun, la ŝoseoj konstruitaj en la pasintaj 26 jaroj post la Liberiĝo ligas ĉiujn guberniojn. En la periodo de la Granda Proleta Kultura Revolucio, oni finkonstruis la fervojon de Giaŭzuo de Henan-provinco ĝis Ĝiĉeng de Hubej-provinco, kiu trapasas la montetan regionon okcidente de la ebenaĵo kaj kreis favorajn kondiĉojn por rapida disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo de la ebenaĵo. Ŝaŝi apud la antikva urbo Ginggoŭ estas nova industria urbo. La bonkvalita kotono produktita de la ebenaĵo estas parte teksita en diversajn ŝtofojn ĉi tie por kontentigi la konsumadon de la loka popolo kaj liveri al aliaj lokoj de la lando, eĉ al internacia merkato. Ankaŭ la industrioj de mekaniko, kemisterko, insekticido, kemio, elektroniko kaj aliaj havas rapidan disvolviĝon. Ĉiuj ĝiaj gubernioj nun jam starigis sian agrikulturilan fabrikon por ripari kaj fabriki diversajn agrikulturajn maŝinojn. Subtenate de la industrio, la bela kaj fekunda Gianghan-ebenaĵo antaŭenmarŝos per ankoraŭ pli grandaj paŝoj.

*Kolektado de lotussemoj*



# Kurantaj Aferoj


## GRANDA TERMOELEKTREJO FINKONSTRUITA EN ŜANDONG

En Ŝandong-provinco de nia lando finkonstruiĝis granda moderna termoelektrejo — la Lajvu-a Elektrejo, kiu jam komencis produktadon.

La elektrejo estas ekipita per tri generatoraj kompletoj de 125,000-kilovatoj kun interne farita duobla akva malvarmigo, de avangarda nivelo de nia lando, kiuj estas projektitaj, fabrikitaj kaj instalitaj de Ĉinio. Ĝi ludas gravan rolon en raciigo kaj grandigo de la elektra produktado de Ŝandong, subteno al la industria kaj agrikultura produktado kaj plibonigo de la popola vivo.


La konstruado de la nomita elektrejo estis komencita en la jaro 1970. Por rapidigi la konstruadon, pli ol 200 unuoj de Ŝanhajo, Anhuj, Giangsu, Ŝenhi kaj aliaj 12 provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj kaj pli ol 100 industriaj kaj trafikaj entreprenoj de Ŝandong donis grandan helpon per liverado de ekipaĵoj, materialoj kaj laborfortoj. Ankaŭ partiaj, registaraj kaj armeaj fakoj kaj la vastaj amasoj de Lajvu faris aktivan kontribuon al la konstruado de la elektrejo.

La Lajvu-a Elektrejo



## AMASA AGRONOMIA EKSPERIMENTADO

Antaŭenpuŝate de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, preskaŭ miliono da diversnaciecaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj intelektaj gejunuloj de la kamparo en la Guanghi-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono partoprenis en agronomia eksperimentado.



*Studento de la Guanghi-a Agronomia Instituto Ŝeng Minĝang (maldekstre) revenis al kamparo post sia diplomitiĝo. Jen li esploras la kreskan leĝon de rizplantoj kune kun membro de la komunuma sciencesplora grupo.*

Nun tie ĝenerale fondiĝis agronomiaj institutoj, stacioj kaj grupoj de gubernio, komunumo, brigado kaj produkta taĉmento. Prenante la kampojn por semoj, eksperimentado kaj alta produkto kiel bazojn, la agronomiaj grupoj de la tuta regiono faras fundamentan konstruadon de kampoj kaj terkulturas laŭ scienca maniero kaj atingis en tio grandan sukceson. Dank' al diligenta kulturado iuj komunumoj kaj brigadoj kreis bonan specion de rizo, kiu havas longajn spikojn kun grandaj grajnoj kaj estas rezistivaj al malsanoj. La jara hektara produktokvanto de rizo de iuj eksperimentaj kampoj superis 15 tunojn.

La diversnivelaj partiaj organizoj de la aŭtonoma regiono entuziasme subtenas la novan socialisman aferon — la amasan agronomian eksperimentadon. En multaj komunumoj kaj brigadoj vicsekretario de la partia organizo zorgas tiun laboron kaj vicestro de produkta taĉmento laboras samtempe kiel ĉefo de agronomia grupo. La partia komitato de iuj gubernioj,

pere de agronomia instituto kaj stacioj por disvastigo de agrikulturaj teknikoj, faras konkretan direktadon al la agronomiaj grupoj de produktaj taĉmentoj. La diversnivelaj gvidantoj tre atentas la fruktojn akiritajn en agronomia eksperimentado kaj ĝustatempe ilin disvastigas.

### PURIGI UZITAN AKVON SINAPOGANTE SUR AMASOJ

Laŭ la principo protekti medion kaj feliĉigi la popolon, la Baŭding-a Tria Kemifabriko de Hebej-provinco traktas malpuran akvon ellasitan en produktado per siaj propraj fortoj por elimini ĝian malpurigon al subtera akvo.

Sub la gvido de la partia filio de la fabriko fondiĝis akvopuriga grupo kun partopreno de gvidaj kadroj, laboristoj kaj teknikistoj. En tiu laboro pli ol 90% de la laboristoj de la fabriko partoprenis ekde oktobro de 1975. En pli ol du monatoj ili finkonstruis basenon por pura akvo, instalis subteran tubaron kaj finkonstruis cirkulajn basenon kaj vazon por traktado de malpura akvo kaj suĉfiltrilon kaj per tio sukcese plenumis la unuaperiodan konstruadon de traktado de malpura akvo. Por la tuta konstruado ili petis de la ŝtato nenian investon. Dank' al la konstruaĵo la ellasita malpura akvo entenanta venenan substancon povas esti denove uzata post traktado, kaj ĝi ne plu malpurigas subteran akvon. Krome ĉiujare oni povas repreni el ĝi 40 tunojn da tinkturaĵo kaj insekticido kaj ŝpari 12,000 tunojn da industria akvo. La malpura akvo ellasita pro la produktado kaj popola vivo fariĝis pura akvo post traktado, kiu povas esti uzata por bredi fiŝojn, kulturi lotusojn kaj irigacii kampojn.

### NOVA DRILEGO POR PROFUNDA PETROLPUTO

La petrola drilego de tipo 130-3 kun avangarda teknika nivelo estas sukcese provfarita de la Lanĝoŭ-a Fabriko de Petrolkemiaj Maŝinoj. Nun ĝi jam estas produktata pogrande. Ĝi estas nova teknika ekipaĵo por rapide kaj bone disvolvi nian petrolan industrion kaj markas, ke nia petrolmaŝina industrio, precipe la farado de drilegoj jam atingis novan teknikan nivelon.

La drilego estas projektita kaj fabrikita de nia lando mem. Niaj boristoj de petrolaj putoj jam faris sinsekvajn industriajn eksperimentojn per ĝi sur Ŝengli-petrolkampo. La praktiko pruvis, ke la drilego kun kompakta strukturo funkcias stabile, havas altan pumpopremon, grandan povon kaj bonan hermetikecon kaj estas facile instalebla kaj manipulebla. Ĝi ne nur mildigas la laborintensecon de petrolistoj kaj rapidigas putoboradon, sed ankaŭ sekurigas la produktadon kaj pro tio ĝi estas varme akceptata de la petrolistoj.

### KOREKTO

En n-ro 5 de 1976, paĝo 5, maldekstra kolono, 9-a linio, "propono" devas esti legata "programo".




## Ĝoja renkontiĝo

En la kvara de aprilo italaj geesperantistoj Leandro Taccani kaj lia edzino Anna Taccani, Franco Galbusera kaj Maurizio Aldrighetti atingis Pekinon por fari amikan viziton kiel membroj de la Turisma Delegacio de la Itala-Ĉina Amikeca Asocio.

Dum sia restado en Pekino la delegacio vizitis fabrikon, popolkomunumon, lernejon kaj historiajn lokojn la Malnovan Palacon, la Grandan Muron, la Dektri Maŭzoleojn, Hiangŝanmonton, la Someran Palacon k.a. La sukcesoj akiritaj de la nova Ĉinio en la socialisma konstruado, la antikvaj kulturo kaj arto de Ĉinio kaj la disvolviĝo de Pekino forte impresis la italajn amikojn.

Vespere de la naŭa de aprilo la Redakcio de *El Popola Ĉinio* okazigis tekunsidon en la Pekina Hotelo por esprimi sian bonvenigon al la italaj esp-istoj. La ĉeestantaj geesperantistoj de ambaŭ landoj havis intiman interparoladon, kaj laborantoj de la redakcio petis opiniojn de la gastoj por plibonigi sian gazeton.

# Song Giang
# —kapitulacisto en "Akvorando"


*(Daŭrigo)*



16. Por akiri amnestion kaj varbon de la kortego kiel eble plej rapide, Song Giang aplikis ĉiajn malhonorajn rimedojn. Li eĉ sendis trezoron al la konkubino de la imperiestro por ke ŝi komuniku al la lasta, ke li estas en la koro fidela al la kortego kaj atendas senpacience dekreton pri amnestio kaj varbo de ĝi.



17. Informiĝinte pri la deziro de Song Giang, la imperiestro sendis ministron de Militaj Aferoj Ĉen kun dekreto kaj brando al Liangŝan por amnestii kaj akcepti la insurekciajn trupojn. Tion aŭdinte Song Giang tre ĝojiĝis kaj ordonis prepari solenan bonvenigan ceremonion en la kastelo, dum Vu Jong kiu oponis kontraŭ tio faris aliajn dispoziciojn kun Li Kuj kaj aliaj.



18. Ministro Ĉen venis ŝipe al Liangŝan. Kiam li surbordiĝis, Song Giang, Lu Gjunji kaj aliaj tuj surgenuiĝis kaj ripetade riverencis al li. Kaj post tio oni portis la ministron kaj liajn sekvantojn al Ĝongji-halo per palankeno kaj ĉevaloj preparitaj de Song Giang.




19. Song Giang ordonis sian subulon voĉlegi la dekreton de la imperiestro. Aŭdinte, ke en ĝi abundas riproĉoj kaj minacoj, multaj el la ĉefoj de la monto forte indigniĝis. Li Kuj kaptis la dekreton kaj tuj ĝin disŝiris; li pugnis Ministron Ĉen kaj aliajn kaj insultis la imperiestron. Song Giang kaj Lu Gjunji ektimegis, ĉirkaŭprenis Li Kuj tutforte kaj tiamaniere liberigis Ministron Ĉen.




20. Ministro Ĉen tre teruriĝis antaŭ la kontraŭkapitulacaj herooj de Liangŝan. Song Giang kaj Lu Gjunji konsterniĝis kaj persone akompanis la kortegajn senditojn por descendi la monton. Song Giang petadis pardonon surgenue, dirante ke ili vere deziras kapitulaci al la kortego kaj ke la afero certe iros glate, se oni nur aldonos pacigajn vortojn en la dekreto.



21. Ne sukcesinte kapitulacigi la insurekciajn trupojn de Liangŝan, la imperiestro ekspedis trupojn por ataki Liangŝan. Sub la komando de Vu Jong, la insurekcia armeo de Liangŝan brave batalis kontraŭ la imperiestraj trupoj, 5-foje venkis la atakantojn kaj en la lasta batalo eĉ kaptis ties komandanton Gaŭ Kiu.



22. Aŭdinte ke Gaŭ Kiu estas kaptita, Song Giang tuj ordonis, ke oni ne mortigu Gaŭ. Kaj vidinte Gaŭ, Song Giang surgenuiĝis por peti lian pardonon. Poste li regalis lin per festenoj dum tri tagoj kaj lasis lin libera petante nur, ke tiu parolu favore por li al la imperiestro por ke la lasta frue alsendu reprezentanton por akcepti kapitulacon. Song Giang antaŭe rigardis Gaŭ Kiu kiel fioficiston, sed kiam la lasta estis kaptita, li klopodis akiri ties favoron. Tio montras, ke ili havas komunajn interesojn en oponado kontraŭ la kamparana insurekcio kaj defendo de la reakcia feŭda regado.



23. Post kiam Gaŭ Kiu revenis al la ĉefurbo, Song Giang sendis juvelojn por subaĉeti la amatan konkubinon de la imperiestro. Nelonge poste, la imperiestro denove sendis reprezentanton al Liangŝan por akcepti kapitulacon. Ĉifoje la kortego faris nenian cedon al Liangŝan krom enskribo de kelkaj trankviligaj vortoj en la dekreto por trompi la insurekciulojn. Song Giang estis tiel ĝojigita, ke li ripetade riverencadis surgenue por esprimi sian profundan dankon al la imperiestro.



24. Kiam Song Giang raviĝis pro tio, ke li baldaŭ akiros ŝtatoficon, miloj da soldatoj de la insurekcia armeo, kiuj ne volis tiajn honoron kaj profiton, forlasis Liangŝan. Tiuj bravuloj batalis multajn jarojn, ne timante la atakon de la imperiestra armeo, kaj nun ili ne volas plu esti trompitaj de Song Giang por humilaĉe kapitulaci al la kortego. Per tio ili montris la revolucian proprecon de la insurekciaj kamparanoj.



25. Post kelkaj tagoj, Song Giang kondukis siajn kapitulacintajn trupojn al la ĉefurbo kun du flagoj kun la surskriboj "Laŭ la Volo de la Ĉielo" kaj "Por Defendi la Regnon" por submeti sin al la kortego. En tia maniero, la kamparana insurekcia armeo, kiun la feŭda kortego ne sukcesis subpremi per armitaj fortoj, tamen estis likvidita de elementoj de la malamika klaso kiuj enŝteliĝis en ĝin, uzurpis ĝian gvidantecon kaj praktikis kapitulacan linion. Song Giang fariĝis helpanto de la imperiestro de Song-dinastio en subpremado de la kamparana insurekcio.



26. Post la kapitulaco, Song Giang foje kaj refoje batalis sinvende por la imperiestro kaj tio vekis fortan malkontenton de liaj subuloj. La tri fratoj Ĵuan kaj aliaj ĉefoj de la surakvaj trupoj iris al Vu Jong por interkonsiliĝi pri denova ribelo. Ili opiniis, ke Song Giang certe ne konsentos kun ili, se li informiĝos pri la afero. Ili do petis ke Vu Jong gvidu la aferon kaj ataku kune kun ili la ĉefurbon, kaj poste reiru al la bazo de Liangŝan. Vu Jong tre simpatiis al ilia deziro, sed li opiniis ke tio estas afero tro grava, kaj li devas interkonsiliĝi kun Song Giang.



27. Vere okazis kiel atendite: Apenaŭ Vu Jong sciigis al Song Giang la malkontenton de la kamaradoj, la lasta tuj perdis sinregecon kaj esprimis ke lia fideleco al la imperiestro estas neŝanĝebla. Li kunvokis la ĉefojn kaj ilin riproĉis, dirante: "Se vi havas alian intencon, unue vi dehaku mian kapon por ke poste vi povu agi laŭvole." Denove per la ŝnuro de konfucianismaj instruoj pri "lojaleco" kaj "justamo" li ligis la manojn de la ĉefoj kaj subpremis ilian postulon de insurekcio.



28. Por plie montri sian lojalecon al la imperiestro, Song Giang meminiciate petis la taskon batali kontraŭ la insurekciaj trupoj de Fang La. Sur la batalejo, Song Giang insultis la insurekciajn kamparanojn nomante ilin "banditoj" kaj kruele buĉis la militkaptitojn. Pro sia "merito" en subpremado de la kamparana insurekcia armeo de Fang La, Song Giang estis premiita per alta rango kaj granda salajro, sed la kamparana insurekcia heroo Fang La estis kruele buĉita de la feŭda imperiestro.




29. La promocio de Song Giang en la kortego vekis fortan jaluzon de Gaŭ Kiu k.a. kiuj apartenis al alia partio de la bienula klaso. La lastaj enmetis malrapide efikantan venenon en la brandon donacitan de la imperiestro al Song Giang. Post trinko de la veneno Song Giang eksciis, ke li mortos baldaŭ, sed li diris: "Prefere la kortego perfidu min, sed mian fidelecon al la kortego mi ne perfidos." Timante, ke Li Kuj ribelos post lia morto, kompromitante lian renomon de "lojaleco kaj justamo", li alvenigis Li Kuj kaj trinkigis al li la venenan brandon.



30. La romano *Akvorando* energie distordas kaj neigas la heroan batalon de la revoluciaj kamparanoj kontraŭ la feŭda regantaro, sed ĉiamaniere prikantas kaj propagandas la kapitulacisman linion de oponado nur kontraŭ koruptitaj oficistoj sed ne kontraŭ la imperiestro por fine kapitulaci al li. Estas evidente ke ĝi propagandas kapitulacismon kaj oponas kontraŭ revolucio, por konduki la kamparanan revolucian movadon sur eraran vojon. Sed la historia tajdo estas nebarebla kaj la kamparanaj insurekcioj leviĝadas unu post alia, senĉese frapadas la regadon de la bienularo kaj antaŭenpuŝas la disvolviĝon de la feŭda socio.

*(Fino)*

# Pentristeto



# Novaj sukcesoj de la Dalian-a Kemi-fizika Instituto




Sciencesplora grupo studas pri nova fonto de energio.




Laboristoj, kadroj kaj sciencistoj kunvenas por kritiki reviziismon.

Dank' al la Granda Proleta Kultura Revolucio, la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj studo de la teorio pri diktaturo de la proletaro, granda ŝanĝo okazis al la Dalian-a Kemi-fizika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. La partia komitato de la nomita instituto prenas klasbatalon kiel ĉefĉeneron, persistas en la fundamenta linio de la Partio, tutkore sin apogas sur la laboristaro, persistas en la direkto servigi sciencan esploradon al la proleta politiko kaj al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj kombini ĝin kun produktaj laboroj, kaj akiris grandajn sukcesojn. La profunda ŝanĝiĝo de la instituto kaj fruktoj de la scienca esplorado akiritaj de ĝi post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio plene pruvis, ke revolucio estas potenca movforto de disvolvo de sciencoj kaj teknikoj.



Dank' al ideologia remuldo la socialisma entuziasmo de la sciencaj kaj teknikaj laborantoj estas plene elvolvitaj. Kunlaborante kun laboristoj pli-ol-50-jara sciencisto Ĝu Baŭlin (dekstre) sukcese plenumis gravan esploran taskon post ripetada eksperimentado.

Persistante en kombiniĝo de laboristoj, kadroj kaj sciencistoj kaj tiu de scienca esplorado, produktado kaj uzado, la instituto bone plenumis multajn sciencajn esploradojn urĝe bezonatajn de la lando en produktado kaj konstruado. Jen esplora grupo studas teorion pri kataliziloj.






La grupo de sensaligo de marakvo faras sciencan esplora-
don kune kun veteranaj laboristoj de tekstila fabriko.





Sciencistoj de la instituto modeste lernas novan sperton de la amasoj en scienca esplorado. Jen ili studas kune kun ĝardenistoj-kamparanoj pri kuracado kaj preventado de malsanoj de pomarboj.



Dum funkciado de la instituto kun malfermita pordo la sciencistoj konscie akceptis reedukon de la laboristaro kaj profunde ŝanĝiĝis ilia spirita fizionomio. Inĝeniero Ju Ĝejaŭ firme iras la vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj kaj diligente studas sciencan teknikon kaj pro tio li estas elektita kiel avangarda laboranto de la urbo Ljuda.




Sciencistoj de la instituto kaj laboristoj de la Dalian-a Tinktura Fabriko kune studis pri traktado de malpura akvo ellasita de la fabriko, dank' al kio entena kvanto de nitrosubstanco de la ellasita akvo reduktiĝis ĝis la normo difinita de la ŝtato kaj samtempe oni povas repreni grandan kvanton da nitrosubstanco.



Disvolvante revolucian spiriton de sinapogo sur propraj fortoj la laboristoj kaj sciencistoj de la instituto fabrikis pli ol 170 sciencajn aparatojn de pli ol 40 specoj kun certa nivelo. Jen sciencistoj kontrolas mezurilon de surfaca areo, kiun oni jam produktas pogrande.

# Fajencaj statuoj trovitaj en tombejo de Kin-dinastio



Kavo de fajencaj homstatuoj.




1,2,3, Elterigitaj fajencaj homstatuoj.

2,




3,





Fajencaj ĉavaloj



6611
KUL

世界语《中国报道》一九七六年第六期（本刊代号：二——九一五）